




5-90*140*

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO





KORESPOND DEZIROJ ANONCOJ

Al eksterlandaj turistoj mi proponas loĝojn en 1 kaj 2-persona ĉambro de urbo Pardubice. Skribu al: Ivana Knířková, Gočárová 584, CS-533 41 Lázně Bohdaneč.

F-ino, 23 j. dez. korespondi. Skribu al Iva Reicheltová, Sokolská 261, CS-412 01 Litoměřice, Ĉeĥoslovakio.

18-jara komencanto dez. korespondi pri sakroj kaj ĉiuj temoj tutmonde. František Krejss, Dukelská 374, 572 01 Polička, Ĉeĥoslovakio.

Mi serĉas ĉion de nia poeto Schulhof kaj la Esper. Bibliotekon por nia rondo. St. Linhart, Ul. Kosmonautů 168, 530 09 Pardubice, Ĉeĥoslovakio.

24-jara oficistino interesiĝas pri turismo, ekologio, naturo - flauro kaj faŭno kaj pri pentrarto. Povus korespondi pri c. t. Renata Stanek, os. Wysokie 4/42, PL-31818 Kraków, Pollando.

30-jara germano, needz. oficisto, geografo vojaĝema, dez. kor. kun homoj preferi ĵurnoj pri viaj vivo-vagadoj, pri kulturaĵoj (ĉefe muziko klasika, literaturo), esperantaĵoj, politiko, lingvoj, Esp. pedagogio. Horst Gruner, Gudenauer Weg 134, D-5300 Bonn.

12-jara lernantino Jolanta Bonkowska, ul. Gw. Ludowej 14/7, 44-121 Oliwice, Pollando - interesiĝas pri muziko, bona filmo kaj bestoj, precipe ĉevaloj, kolektas vidkartojn, volas trovi ĵurnajn geamikojn en nia lando.

19-jara polino dez. kor. eksercacele, alte takas sincerecon, amikecon kaj homojn kun mumsento, interesiĝas pri modo, tre ŝatas vojaĝi: Hanna Kulbacka, ul. Głogowska 146/8, 60-205 Poznań, Poll.

19-jara lernantino interesiĝas pri geografio, turismo kaj futbalo, kolektas bildkartojn kun automobiloj, ŝatas legi librojn, ĉiuj kaj danci, tre ŝatas bestojn. Božena Škariyánska, ul. Dobrego Pasterza 127/57, 31-416 Kraków, Pollando.

25-jara studento pri rusa kaj germana lingvoj interesiĝas pri kulturoj de aliaj popoloj, E-movado kaj esperantologio, lernado de fremdaj lingvoj kaj turismo. MEDVECZKY Gábor, Debrecen, Ibolya u. 9, et: 1, ap: 4, 4027 Hungario

31-jaraĵa historiisto kaj preleganto en la pedagogia supera lernejo, dez. korespondi kun ĉiuj ĝesp-j pri ĉiuj temoj, precipe kun samfakuloj pri politologio, filozofio, E-movado kaj ĝia historio, religio kaj ateismo, superaj lernejoj; interesiĝas pri interŝanĝo de E-eldonaĵoj. Igorj Simonov, Ĝenkinoj 39 A-15, SU-603105 Gorkij, Sovet-Unio.

Pjaticoraka Esperanta Klubo "Masuko" estus tre dankema al ĉiuj, kiuj povas kontribui diversajn materialojn pri fama rusa poeto Lermontov M. por krei Esperantan fakon en la urba muzeo de M. Lermontov. Adreso: V. Tretjakov, ul. Fucika 9/21, Pjaticorsk, 357524 USSR

25-jara komencanto ŝatus korespondi pri ĉiuj temoj, sed ĉefe pri la vivo en Ĉeĥoslovakio. Li tre ŝatas: natura medicino, filozofio de Oriento, NIPON, metafiziko, ekologio, natursciencoj ktp. Edgar de Freitas Nunes, General Portinho n-ro 544, apartamento 2, centro, 90.010 PORTO ALEGRE - RS - BRAZIL Lia fianĉino: Marcia Regina Becker, Dona Firmina n-ro 315, Joao Pessoa, 91.500 PORTO ALEGRE - RS - BRAZIL Ili partoprenas en "ESPA - Esperanto-Societo de Porto Alegre", kolektas urbobildkartojn kaj suvenirojn.

32-jara viro, kies hobiaj estas aŭskultado de muziko, studado, amikeco, domcaj kaj ideoj interŝanĝoj, konas svahilan, anglan kaj Esperanton, volas korespondi kun la tuta mondo. Adreso: S-ro Sylvester N. Nyinyimba, P.O. Box 147, Bunda, Tanzanio.

Jiří Kořínek

elbovalo NORDBOHemia

El freŝa verdo de april'
radias nova fido,
kaj antaŭ nia vido
la beloĵ marŝas en defil'.

Laŭlonge Elbon gvidas voj',
disfloraj arboj ravas,
okul' frandaĵon havas
kaj koro trinkas el la ĝoj'.

Blankvestaj fianĉinoj tuj
afable nin salutas,
kaj florkaresojn ŝutas
pomuj', pirujo, ĉerizuj'.

Pri Elbovalo kun admir'
kelkiu jam parolis,
ĝi en apreso rolis
de Humboldt, vojaĝsperta vir'.

Se venos vi al Ústí, nu
aprile dum vojaĝo,
ekpasu mem kun plaĉo
laŭ Elbo, kontraŭ ĝia flu'!

Montrigos al vi kun surpriz'
juvel' de nia lando,
kaj ĉiu bel-amanto
konsentos: pec' de paradiz' ... !

Ni solenas ĉi-jare jubileojn de du eminentaj personoj de nia lando, nome la 140-an datrevenon de naskiĝo de Tomáš G. Masaryk kaj 100-an datrevenon de naskiĝo de Karel Čapek.

La unua prezidento de Ĉeĥoslovakio Tomáš Garrigue Masaryk estis elstara filozofo kaj sociologo, politikisto kaj ŝtatestro. Li naskiĝis la 7-an de marto 1850 en Hodonín kaj dum tuta sia vivo li batalis por la vero. En la tempo de la unua mondmilito li gvidis la batalon kontraŭ la habsburga monarkio, kio rezultis en fondiĝo de memstara Ĉeĥoslovakio en la jaro 1918. De la popolo li estis nomata "Prezidento-Liberiginto".

Karel Čapek estis eminenta verkisto kaj ĵurnalistoj, prozisto, dramverkisto, poezitradukisto kaj felietonisto. Li naskiĝis la 9-an de januaro 1890 en Malé Svatoňovice, kie lia patro estis kuracisto. Post filozofiaj studoj li estis mallonge dramaturgo de Teatro en Vinohrady, poste ĵurnalistoj, redaktoro de Lidové noviny (Popola ĵurnalo). Lia literatura verkaro estas ampleksa, ĝi okupiĝas pri la ordinara vivo de la ordinara homo, sed ankaŭ pri modernaj sciencoj, tekniko, belartoj, kulturo kaj literaturo. En liaj verkoj respeguligas liaj filozofiaj konceptoj relativismaj kaj pragmatisme humanismaj, en la tridekaj jaroj aldonigas antifaŝisma sinteno. K. Čapek estis nialanda pioniro de utopia - scienc-fikcia romano kaj dramo (Fabriko por absoluto, Krakatito, Milito kontraŭ salamandroj; RUR, La afero Makropulos). Liaj filozofiaj konceptoj estis esprimitaj en romanoj Hordubal, Meteoro kaj Ordinara vivo, plus en multaj liaj rakontoj, el kiuj la detektiv-temaj aperis en formo de Rakontoj el unu poŝto kaj Rakontoj el la dua poŝto, kaj ankaŭ en liaj felietonoj, inter kiuj apartan valoron havas liaj vojaĝpriskribaj felietonoj (Italiaj leteroj, Anglaj leteroj, Ekskurso en Hispanion, Skizoj pri Nederlando). Gravaĵ kaj ĉiam ludataj estas liaj dramoj (Rabisto, RUR, El la vivo de insektoj, La afero Makropulos, Adamo la Kreinto, Blanka malsano, La patrino). Li verkis ankaŭ por infanoj (Mau fabeloj, Dášěnka) kaj liaj tradukoj el la franca poezio ("Franca poezio de nova tempo" - kun poemoj de sesdek da poetoj) farigis nutrofonto por tuta generacio de ĉeĥaj poetoj. Li enloigis en la kontraŭfaŝisman fronton per sia romano "Milito kontraŭ salamandroj" kaj per avertaj dramoj "Blanka malsano" kaj "La patrino". La malboniganta monda situacio pro la faŝisma ekspansio kaj precipe la Hitlera premo kontraŭ Ĉeĥoslovakio influis lian sanstaton tiom malfavore, ke li peze malsanigis kaj mortis la 25-an de decembro 1938 en Prago, en aĝo de neĝisvivintaj 49 jaroj.

Por Karel Čapek havis grandan signifon liaj personaj kontaktoj kun prezidento Tomáš Garrigue Masaryk. Inter ambaŭ viroj evoluis aparta rilato, rilato spirita kaj emocia. El interparoloj, kiujn Čapek havis kun Masaryk, estis verkita libro "Interparoloj kun T. G. M.". La unuaj notoj por la libro devenas el la j. 1926, la unua parto de la libro estis publikigita en la j. 1928, la lasta en la j. 1935. La libro, en kiu enestas naŭjara interparolo kun Masaryk, prezentas la vivon kaj ideojn de la unua prezidento de Ĉeĥoslovakio.



Karel Čapek

SUB SPECIE AETERNI

El "Interparoloj kun T. G. Masaryk"

Do teisto; vi akceptas teismon - per kio? Per sento? Per racio? Per kredo?

Per racio; kian rolon havas ĉe tio la kredo, tio apartenas jam al problemoj religiaj. Mi akceptas teismon per sperto kaj per racia intelekto. Argumentojn kaj pruvojn por teismo donas al mi la racio.

Kiujn pruvojn?

Precipe pruvon teleologian. Celeco de la mondo, de la vivo, de la historia okazado, de nia kono kaj de la etika klopodado gvidas min al rekono de kreinto, direktanto de ĉio, persona estaĵo spirita kaj senfine perfekta. Dio mem estas racio, estas nous, logos. Tion komprenis jam la grekoj, kiam ili liberigis sin de la mitaj politeismo kaj fetisismo; racio, diris jam Anaxagoras, estas ordiganto de kosmo, kaj pro tio laudegas lin Aristotelo, ke li "estas veninta kiel sopra inter ebriligintojn".

Kaj per kio Vi pruvus tiun celecon?

Per sperto kaj per racio. Plimulto da homoj ja kredas je celeco sole dumone kaj sufiĉe nekonscie. La homo, kiu komplete kaj konsekvence ne ordon en la mondo kaj celecon de ĉio, eĉ de sia propra vivo - mi petas, kiamaniere povus li vivi kun tia ideo? La racio mem ja konstata kaj certagrade konstruas racian ordon en ĉio, kion ĝi ekkonas; la racio jam

pro sia naturo iras al ordo kaj al celeco, ĝi mem metas celojn; paroli pri hazardo kaj senceleco de la mondo estas kontraŭ la racio, racio mem estas ilo de ordo kaj teleologio. Laŭcela mond-ordo estas donita de la racio, nia kono mem estas teleologia.

Kaj kiel vi klarigos, el kie, kial kaj por kio estas ĉia malbono, doloro kaj malfelico, militoj kaj katastrofoj?

Mi ne klarigos. Mi ne scias klarigi. Sed nek monismo, nek panteismo, nek dualismo nek materialismo kaj tiel plu sukcesos tion klarigi pli bone; mi fidas al teismo, ĉar ĝi estas el ĉiuj eblaj hipotezoj la plej simpla. Diru, kial devus tio malbona, doloriga, sensenca, kion la vivo donas al ni, valori pli ol tio sana, felica kaj beleca? Da bono estas en la mond-ordo pli; sed tiu malbonon la homo sentas pli forte. Honeste klarigi, por kio servas neperfekteco, sufero kaj tiel plu, mi ne scias; sed mi vidas, ke la homo kaj la homaro povas kaj devas kontraŭstari neperfektecojn. Sen venkado de malhelpoj, sen trudaĵ kaj iam eĉ dolorigaj kaŭzoj por agado la vivo ne estus vivo kompleta. Mi pensas, ke filosofio ne bezonas advokaton. Kaj refutadi pesimismen? Malsano, malriĉo, krimoj kaj tiel plu ne estas per paroloj refuteblaj. Ne pensu, ke mi neas al mi malharmoniaĵojn kaj mizerajn materiajn kaj spiritaĵojn. Kiam mi antaŭ ne longe venis Moravion en Židlochovice, mi audis tie kanti najtingalojn, ho, belege. Oni diris al mi, ke ĉi-jare la najtingaloj kantas, ĉar ili havas suficon da kuloj. Kaj traigis mian cerbon penso: Tiuj najtingaloj, jen, ĉu ili kantas siajn dankojn al Sinjoro Dio pro tiuj kuloj? Kaj kion tiuj kuloj - tiu ilia sumado estas ankau laŭdkanto pro tio, ke najtingaloj ilin glutas? Teleologio - malmola nukseto, sed eĉ se oni ne dentrompas ĝin, ĝi tamen pli facile estas tenata en la manplato ol la teorio pri senceleco, hazardo kaj haoso.

Dua argumento de teismo, ni ja havas, jen, pruvon nomitan kosmologia: sen unua kaŭzo, sen unua kreinto kaj moviganto ni ne povas kompreni estiĝon, movon kaj evoluon de universo. Laŭ vidmaniero kaŭzeca ni devas meti ian komencon de tiu kaŭzo-ĉeno; ne sufiĉas al ni, mi pensas, akceptadi suborditajn kaŭzojn ĝis senfino. Kaj pri la pozitivisma ignorabismo, doktrino pri nekonebleco de la unuaj kaŭzoj, agnostikismo, generale mi ne opinias, ke ĝi estas klarigo de la mondo kaj de la vivo.

Jam psikologie ĝi estas miriga: malpermesi al si demandojn pri la unuaj kaŭzoj. Ĝi estas kiel fabelo pri naŭ salonoj. En ĉiujn salonojn vi rajtas enpasi, sole en la dekan ne. Poste oni pensas, ke en tiuj naŭ nenio inda estas kaj ke unusole la deka valoras.

Proksimume tiel; kaj ne estas en ĝi pli, eble nenio. Hume kaj Comte faris eraron, kiam ili rifuzadis a limine serĉadi kaŭzojn - Comte tion eĉ malpermesadis preskaŭ policmaniere; li ankau laŭ tio finfartis, li prenis por si da malpermesita pano la plej grandan pecon, li enfalis en miton ĝis la oreloj.

Mi pensas, ke moderna naturscienco per sia doktrino pri entropio certigas Aristotelan postulon de la unua kaŭzo: se la mondo laŭ la mekanika teorio de kaloro finiĝos per egala temperatur-grado en ĉiuj siaj partoj, do per varmomorto, tiam la mondo ne estas depost la eterno, sed ĝi ko-

menciĝis en la tempo kaj en la tempo havos eĉ sian finon. Mi scias, ke tiu argumento de kelkaj fizikistoj ne estas akceptata.

Ekziston de Dio vi pravas sole per tiuj du argumentoj?

Jes. Pli precize dirite, hipotezon pri ekzisto de Dio por la scienco teismo estas hipotezo, kiu laŭ postulo de logiko estas pli simpla kaj sekve pli pravigebla ol hipotezoj aliaj, ekzemple materialismo kaj similiaj. Mi iras pluen: kiel teisto, kiel pluralisto mi akceptas ankau ekziston de animo kaj ĝian senmortecon, mi estas certa pri ekzisto de animo kaj de animoj; sed pravi tion laŭracie per argumentoj, kiuj ĉiun silentigus, - tion mi ne scias. Estas ja sciencistoj, kiuj defendas materialismen, panteismen, monismen kaj tiel plu - mi ne rigardas min nearpova kaj scianta ĉion pli bone. Mi pensas, ke hipotezo de animo senmorta ne kontraŭstaras biologion kaj psikologion, ne kontraŭstaras sciencen. Iam, en la juneco, min incitadis, ke mi ne havas pruvojn absolute konvinkantajn. Hodiaŭ mi diras al mi: ĉu ni estas devigataj, ĉu ni ja povas scii ĉion kaj posedi tion skribitan laŭ notaria maniero? Kia estus la mondo, se ĝi estus sen sekretoj por ni! Se ni kredus, ke ni scias ĉion, ni dikiĝus tro. Kiam mi estis simpla instruisto kaj instruadis filozofion, venadis al mi knaboj kaj demandadis tion kaj ion; ili ne povis kompreni, kiam mi diradis al ili - mi ne scias. Ili miris, kia filozofo estas tiu, kiu ne havas respondon pri ĉio.

Sed eĉ se vi ne povas senmortecon de la animo pravi, vi devas havi almenaŭ motivojn, kial vi ĝin akceptas kun certeco.

Tion jes. Mi ne povas al mi prezenti, ke tia bela kaj delikata aĵo, kia estas la pensado, ekkonado, pieco, morala tendencado, perceptado de beleco, la tuta kulturo, ke ĝi povus perdiĝi, ke ĝi povus esti por nenio. La fizikistoj diras - la energio ne povas perdiĝi; kaj ĉu tiu energio en ni? La animo movas la materion, la racio donas al la materio formon, difinas ĉelon kaj ekkonas tutan tiun mondon: ĉu ja povas tiu materio daŭri - kaj la animo ne? Ĝi estus miriga.

Kaj poste: la vivo mem deklaras kontraŭ la morto. Kompreneble, ĉio vivanta mortas; sed ĉio vivanta havas egan volon daŭri, transdaŭrigi sin mem, daŭri ident-maniere. La vegetaĵo denove revivas en sia idaro, transdonas ĉion pluen kaj nenion el siaj kvalitoj perdas. Unusole animo ne estus heredata, unusole animo ne havas daŭrigon. Ĝi estus nenatura.

Oni povus diri - ni transvivas nin en niaj faroj. Sed al kiom da homoj ĝi sukcesas transdoni al la estontaj generacioj efektivan verkon? Unuj mortas junaj, al aliaj ne estas donita ebleco uzi sian talenton. Mi ne povas pensi, ke povus simple perdiĝi tiu ebla verko en ili. Ĝi estus nejusta.

Mi ne povas pruvadi senmortecon de la animo; sed duaflanke - ni ne povas efektive prezenti al ni ne-eston, ne-vivon; ni povas al ni prezenti finon de la vivo sole negative: ke ni ne vidas, ne audas, ne scias. Nia nocio de morto estas tiom malplena kiom nocio ne-arbo aŭ ne-herbo. Eble pro tiu malpleneco ni timas la mor-

ton kiel nigran truon.

Temas pri kiu-iu: mi morton ne timas, multaj homoj ĝin ne timas. Primitivuloj ne konas la timon pro la morto, mezepoko ĝin ne timis - nur la moderna homo havas timon pro ĝi. Unus li timas la dolorojn pli ol iamaj homoj -

- kiel tion verkis mortanta Wolker: "La morton mi ne timas, la morto ne estas malbona, ĝi estas sole parto de vivo malfacila. Mortadon mi timas."

Kaj due - multa moderna homo timas la morton, ĉar li estas tro ĝuema - la vivo ne estas por li granda dramo, li volas de ĝi sole manĝon kaj ĝuon; li estas nekredanto je Dio, ne estas en li sufiĉo da fido kaj sindedico. La moderna memmortigemo kaj timo pro la morto - tiu duopo interrilatas, same kiel rilatas timo kaj fugo. Sed tio estus problemo por si mem. Kiam mi pensas pri senmorteco, mi ne pensas tion pri la morto kaj kio estos post ĝi, kion pri la vivo kaj ĝia enhavo. Al mi senmorteco sekvas el valoro de la homa vivo, de la homa animo. La homo al si mem, homo al la homo, estas pli valora kiel estaĵo spirita. Kaj senmorteco de la animo sekvas ankaŭ el rekono de Dio, el kredo je mond-ordo kaj justeco. Ne estus justeco, ne estus perfekta egaleco sen eterneco de la animoj. Kaj fine - senmorteco estas travivata jam nun, en tiu ĉi vivo; ni ne havas spertojn pri la vivo postmorta, sed ni havas, ni povas havi sperton jam nun, ke vivon laŭveran kaj komplete laŭhoman ni vivas sub specio aterni. Tiu sperto dependas finfine de ni, de tio, kiel ni vivas, de kio ni estas plenaj, kaj kion ni klopodas el nia vivo fari. Sole kiel animo inter animoj ni vivas nian vivon laŭ vereco kaj komplete. Ekzisto de animoj estas efektiva bazo de demokratio: eternaĵo ne povas esti indifera al eternaĵo, senmortulo egalas senmortulon. El tio amo al la proksimulo ricevas sian apartan - oni diras metafizikan - signifon.

Tradukis S. Kamaryt

Ni funebras

La 24-an de februaro 1990 mortis s-ro František S t a n ě k , multjara oferema kaj laborema esperantisto, honora membro de ĈEA. Pri Esperanto li meritigis precipe kiel instruisto kaj propagandisto.

En aĝo de 67 jaroj subite forlasis nin s-ino Vlasta H o r á k o v á la 12-an de marto 1990 en Nová Dubnica. Ŝi estis ŝatata lektorino de la korespondaj kursoj de ĈEA kaj ŝi propagandis nian asocion ankaŭ en Slovakio.

La 3-an de majo 1990 forpasis post mallonga, sed peza malsano en aĝo de 83 jaroj s-ino Božena J e l í n k o v á en Kolín. Bona samideanino, klubanino kaj multjara instruistino.

Multjara membro kaj instruisto de Esperanto s-ro Arnošt H o j d y s forpasis en Vítkovice.

Honoron al ilia memoro!

Rudolf HROMADA 100 jaroj

La 9-an de novembro 1990 pasis cent jaroj ekde la naskiĝo de elstara ĉeĥoslovaka esperantisto Rudolf Hromada. Li plenumis elstarajn funkciojn en la landa organizaĵo ĉeĥoslovaka kaj en la internacia movado: ĝenerala sekretario de ĈAE kaj vicprezidanto de EACSĜ, membro de Internacia Centra Komitato, komitatano kaj honora membro de UEA, membro de Lingva Komitato kaj de Akademio de Esperanto, aktivulo en internaciaj konferencoj kaj kongresoj. Aŭtoro de eminentaj vortaroj, talentita poemtradukanto, eldonanto kaj redaktoro de altnivela gazeto "La Progreso", esperanta radioparolisto. Li mortis la 26-an de oktobro 1964 en Praha.

Jes. Rudolf Hromada estis mia instruisto, al kiu mi dankas la fakton, ke mi farigis bona esperantistino, ke mi penetris pli profunden en la Zamenhofan testamentojn, ke mi ekkomprenis kaj por la tuta vivo ekamis ĝin. Sed Rudolf Hromada estis eĉ multe pli: li estis mia pli aĝa amiko, tiu plej bona, tia, kian oni estimas kaj al kiu oni fidus senescepte, amiko helpema kaj komprenema. Ofte mi rememoras lin, ĉiam ne povante plene kompreni kaj plene konsciigi, ke li ne plu estas ... kaj tamen, tiom da jaroj pasis, depost kiam mi visitadis lin, kiam ni kune laboris, kiam ni fieris unu pri la alia ...

Mi konatiĝis kun Rudolf Hromada en Hradec Králové. Iom bizare, ĉu ne? Nome, mi tiam loĝis kaj laboris en Týniště n. O. - post la terura dua mondmilito ni provis establi tie profesion teatron - kaj kiam mi en kelkaj monatoj alproprigis esperanton tiel, ke mi estis kapabla flue paroli, mi komencis visitadi la esperantan klubon en Hradec Králové (gvidis ĝin tiam la fame konata s-ano Pytloun). Mi estis memlernantino, lerninta la verdan lingvon sole laŭ gramatikaj libroj kaj vortaroj kaj aŭdis ĝin parolata nur en tiu Hradeca klubo. Kaj foje, ĉeokaze de iu solena kunveno, alveturis el Prago ankaŭ sinjoro Hromada. Mi ĝis tiam nur aŭdis pri li, memkomprene mi sciis, kiu li estas, kaj kun ioma timtremo atendis la renkontiĝon kun tiel fama kaj por mi preskaŭ fabele neatingebla esperantista aŭtoritato. Dio, kiel juna mi tiam estis ... ah, kien la pasintjaraĵoj neĝoj malaperis ...

Do, tiun vesperon oni starigis min antaŭ iom pli aĝan sinjoron, iom severe aspektantan, kaj prezentis min. Mi tiel bone rememoras pri tio - kiel sinjoro Hromada la tutan vesperon parolis kun mi, demandis, kiel longe mi lernas esperanton kaj miris eksciinte, ke nur kelkajn monatojn. Mian kuraĝon pli kaj pli kreskigis liaj afablaj, kavalire gentilaj komplimentoj kaj fine mi babilis jam tute senbare. Sed kiam ni adiauis, sinjoro Hromada diris al mi subite: "Via esperanto estas gramatike senerara, sed la akcento ne tute ĝusta. Ĝi ne sonas malbone, tamen iom nekutime kaj strange."

Nu jes, mia akcento ne estis bona tiam - ja mi lernis la lingvon nur laŭ libroj. Tium vesperon, reveninte hejmen al Týniště, mi prenis la esperantajn librojn kaj la tutan nokton laŭte legis tekstojn. Mi deziris, me, mi sopiris, avide, freneze mi sopiris tuj, rapide forigi tiun mankon - kaj mi sukcesis. Kompreneble - ne dum tiu unua nokto ...

Pli poste, kiam mi mem instruis esperanton, tre urĝe mi devigis miajn lernantojn paroli de komenco kun gusta akcento - laŭ mia propra sperto mi sciis, kiel malfacile estas la malbonan akcenton dekutimigadi.

Kiam mi el Týniště revenis al mia naskiĝurbo, al Prago, komenciĝis mia daŭra kontakto kun sinjoro Rudolf Hromada. Li estis gramatikisto kaj instruis al mi tiel nomatan "altan gramatikon"; laborante kun li nur tiam mi lernis plene kompreni, kia lingvo estas esperanto, li malkevis al mi ties ĉiujn belecojn, belaĵojn kaj ĉarmojn, li gvidis min en logajn kaj interesajn aventurojn, dum kiuj mi kunmetadis kaj kreis vortojn aldonante prefiksojn kaj sufiksojn, li sciis entuziasmigi min pri kaj por la uzado de aktivaj kaj pasivaj participoj, gerundioj, kaj paciencie akompanis min tra la mistera mondo de kunmetitaj tempoj. Ah, kara sinjoro Hromada - kion ĉion mi dankas al vi! Ja estis ankau sole via merito, ke mi post mia naŭmonata esperanta ekzisto kapablis submeti min al la stata eksamenado kun rezulto "Eminente" ...

Kaj Rudolf Hromada ne estis nur gramatikisto, sed ankau poeto, kvankam li ne verkis eĉ ununuran originalan poemon. Sed li tradukis poeziaĵojn tiel perfekte, kun tiaj sentemo kaj poezia senco, kiel sole poeto kapablas. Ja ĝis hodiaŭ en la esperanta literaturo havas sian altsignifan renomon la ĉeĥa "Ora trio" tradukistoj: Hromada, Lukáš, Pumpr. Kaj kiel tradukiston mi estimis kaj admiris lin eble ankoraŭ pli - se tio entute eblas - ol kiel gramatikiston. Mi estas ja akterino kaj recitantino - kaj Hromada tradukis por mi multajn poemojn de mia ĉeĥa poezia repertuaro, precipe poezion de mia amata Frána Šrámek, sed ankau poemojn de Viktor Dyk, Antonín Sova, J. S. Machar kaj aliaj. Kaj laŭ tiuj tradukoj mi povis plej bone pritaksi la lingvan perfektecon kaj poetan talenton de Rudolf Hromada, sed ankau liajn obstinan precizon kaj senlacen diligenton, delikatan senton kaj poezian sencon, kun kiuj li cizelis ĉiun verson, pretis dum heroj priparoladi eblajn nuancojn, serĉante tiun plej bonan. Denove kaj denove li igis min reciti la poemon ĉeĥe kaj poste en la traduko, li komparis kaj se li ne estis plene kontenta, ne hezitis eklabori eble eĉ de komenco. Sed la rezulto estis ĉiam perfekta - ofte mi bedaŭris, ke la eksterlanda auskultanto aŭ leganto ne povas plene ĝui perfektecon de la traduko, ne komprenante la ĉeĥan originalon. Pri tiaj miaj plendoj sinjoro Hromada kompreneble nur ridetis - "Por ĉeĥa leganto ne necesas ja la ĉeĥan poezion traduki - ni volas montri ĝian belon al tiuj, kiuj ne povas ĝui la originalon", li respondadis.

Multajn poemojn sinjoro Hromada tradukis por mi. Foje li finis tradukon de "Kluzo" (Frána Šrámek) kaj mi recitis la poemon.

"Ege sufera pensas mi,
kie mi satus vin trovi ... "

Kiam ni tiun tagon adiaŭis, Hromada subite diris al mi kun facila rideto: "Tiun ĉi poemon vi recitos al mi lastafoje - ĉe mia kremacio..." Tiam ektimigite mi protestis - mi absolute ne povis nek volis imagi, ke tiu mia granda amiko, instruisto kaj kunlaboranto en ĉiarto simple ne plu ekzistus - kaj tamen venis tago, en kiu mi ĝtaris, nigre vestita, en krematorio antaŭ la ĉerko kaj koncentrigis ĉiun mian aktoran scipovon por senplene kaj per voĉo ne tremanta de doloro plenumi la deziron de tiu, kiu la unuan fojon ne rekompencos mian recitaĵon per kontenta rideto ... "ege sufera pensas mi, kie mi satus vin trovi..."

Multe vi donis al mi, sinjoro Hromada, amiko mia - pri ĉio, kion mi bone faris en Esperantujo, pri ĉio, kion mi konas, scias kaj scipovas - pri tio mi dankas vin. Vi meritas pri tio, ke mi trovis mian lokon en la verda patrujo. Kaj vi devus scii, ke ofte mi eĉ nun bezonas vin, vian iom ironian rideton, vian konsilon, vian helpon - ke ankoraŭ nun "ege sufera pensas mi, kie mi satus vin trovi...", ah ne, kie ajn mi satus trovi vin, kie ajn - kaj mi trovos vin nenie plu. Sed, kvankam mia propra tago jam ankau transpasis sian sunkulminon kaj kliniĝas al vespero, tamen mi ĉiam, ĉe ĉiu okazo fiere kaj kun respekto deklaras: "Jes, li estis mia instruisto ..."

Eva Seemannová

Frána Šrámek

Fabelo

Kiel infano ... Fabelo vi estas
kaj mi infano.
Ploras lagetoj, en revoj lun' nestas.
Kien knabinjo? Kaj kies vi estas?
Fabelo vi estas
kaj mi infano.

Ie la mondo kaj sango eĉ ie,
tie ĉi vojoj sub sorco sen-ama.
Vokos mi amon: aperu ĉi tie,
kor' mia - pura kaj voco - infana.

Fabelo vi estas. En revoj lun' nestas.
- Kien knabinjo? Kaj kies vi estas?
Mi ploras infane.
Fabelo vi estas.

("Života bído, přec tě mám rád")

Tradukis Rudolf Hromada

IVAN H. KRESTANOV

La nuna jaro estas aparte rica je centjaraj jubileoj. Unu el ili estas tamen tre signifa - temas pri la jubileo de la bulgara Esperanto-aktivulo Ivan H. Krestanov.

Li naskiĝis la 28-an de oktobro 1890 en Pirdop en malriĉa familio. En la j. 1904 li eklernis Esperanton, al kiu li restis fidela dum sia tuta vivo. Li studis en Francio kaj Germanio kaj poste farigis diplomita filologo kaj juristo; en Bulgario li estis lektoro de fremdaj lingvoj en varna, Botevgrad, Plovdiv kaj Sofio, kaj ĉie apud la germana kaj franca lingvoj li instruis ankaŭ Esperanton.

En 1912 li eldonis lernolibron de Esperanto, poste vortarojn Esperanta-bulgara kaj bulgara-esperanta (aperis tri eldonoj). Li kompilis Bulgaran antologion, por kiu li tradukis verkojn de pli ol 40 bulgaraj beletristoj kaj poetoj. Plue aperis "Nuntempaj rakontoj" kaj "Vilao apud la maro" de G. P. Stamatov. Cento da liaj tradukoj aperis en diverslandaj Esperantaj gazetoj. Post la unua mondmilito aperis lia libro "La bulgara lando kaj popolo" kaj poste dudeko da libroj kaj broŝuroj en lia "Bulgara Esperanto-biblioteko". Dum kelka tempo Krestanov redaktis la organon de BEA "Bulgara Esperantisto", kaj kunlaboris al "Enciklopedio de Esperanto".

Li ŝatis vojaĝi kaj dum 15 jaroj li traveturis la tutan Eŭropon farante pli ol mil prelegojn pri sia patrolando. Estante en Parizo li laboris kiel redaktoro en la eldonejo de Sennacieca Asocio Tutmonda. Pro siaj lingvaj kaj literaturaj meritoj I. Krestanov estis elektita membro de la Lingva Komitato (1912 - 1929) kaj membro de la Akademio de Esperanto (1947 - 1966).

Li mortis la 4-an de septembro 1966 en Sofio. Li lasis neelviŝeblan spuron en la historio de la bulgara kaj ankaŭ de la monda Esperanto-movado.

El la verko "La Bulgara Lando kaj Popolo" ni citu specimene, kion Krestanov skribas pri la bulgara virino:

Kaj la bulgarino? Ŝi estas sana, herca, forta kaj laborema kreitaĵo, fidela kamarado kaj modela domomastrino, ideala patrino kaj edzino. Jam de infaneco ŝi alligigas al siaj gepatraj moroj kaj kutimigas administri ĉiujn en- kaj eksterhejmajn aferojn. Somere kaj aŭtune ŝi estas sur la kampo, helpante - ofte kun siaj infanoj - la patron aŭ la edzon, kaj vintre en la hejmo ŝi ŝpinas aŭ tekas. La kortbestaron ŝi prizorgas; la neĵman laboron ŝi direktas kaj kondukas persone. Unuvorte, ŝi estas tute inteligenta, lerta, vigla kaj sperta domomastrino, kaj nenio povas okazi sen la partopreno de sia rezonema saĝo kaj de siaj feraj manoj. Krom tio ŝi estas tre ŝparema kaj modesta en siaj rilatoj. La vilaĝanino malsatas ĉion, kio difektus siajn hejmajn kutimojn, kaj malestimas la maldiligentulojn. Siajn infanojn ŝi de frue instruas pri laboro kaj ofte riproĉas sian edzon, kiam li ne laboras.

Asociaj Esperanto-eksamenoj 1990

La Asociaj Esperanto-eksamenoj en ĉi tiu jaro estas kunligitaj kun la datoj de 22-a - 24-a de aprilo kaj kun la urbo Olomouc.

En ĉi tiuj tagoj en la hanaka metropolo kunvenis 22 interesuloj el la tuta Ĉeĥa respubliko por pruvi antaŭ 7-membra eksamana komisiono la nivelon de siaj lingvaj kapabloj kaj konoj en Esperanto.

Kvankam la nombro de partoprenantoj estis kompare kun la antaŭaj jaroj iom pli alta, la organizantoj - membroj de junulara sekcio de Esperanto-rondeto en Olomouc - sukcesis prizorgi la tutan agadon eminente.

La eksamenoj okazis en la altlerneja kolegio "17-a de novembro", kie oni prizorgis ankaŭ loĝadon de partoprenantoj. Certe ankaŭ danko al tio oni kreis dum la tuta semajnfino, malgraŭ negranda komprenebla timotremo de kelkaj partoprenantoj, agrablan kamaradecan atmosferon, kiu evidente influis eĉ la rezulton de la eksamenoj. Ĉe la eksamana komisiono, en kiu kunsidis ekzemple s-ino Barandovská aŭ s-ro Vondroušek, sukcesis preskaŭ ĉiuj kaj dimanĉe antaŭtagmeze ili akceptis la merititan ateston pri la sukcesa plenumo de la eksamenoj.

Krom la eksamenoj dum la semajnfino okazis en Olomouc ankaŭ kunveno de junulara Esperanto-sekcio, dum kiu oni ne nur pritaksis pasintan periodon, sed ĉefe oni pritraktis agadon por la venonta periodo. Samtempe estis elektita nova 7-membra komitato de junulara sekcio de ĈEA.

Ni opinias, ke ĉi tiu Esperanto-semajnfino sukcesis kaj ke dimanĉe ĉiuj partoprenintoj disveturis en siajn hejmojn kun impresoj de agrable kaj aktive travivita semajnfino kaj kompreneble kun plusa intereso pri laboro en la Esperanto-asocio.

M.N.



La amika vizito

Je invito de E-klubo en Weiden, precipe de siajoro Dandorfer, dek junaj gesamideanoj de E-rondeto ĉe ZK Tesla Pardubice visitis Federacian Respublikon Germanujo.

Jem ĉe landlimo ni estis de gastigantoj kore bonvenigitaj. Post loĝigo en ĉarma pensiono de naturamikoj en Trauschendorf ni veturis al ekskursita loko "Monto kaolina". Tiu ĉi artefarita monto de kaolina defalaĵo nun servas por ripozo de visitantoj kaj loĝantoj de la regiono.

Hblas ĉi tie sur la blanka sablo sunbruniĝi kaj ĉafe, eĉ somere, skiadi sur kaolina sablo. Apud la monto situas ankaŭ baseno por agrabla somera banado. Belajn momentojn ni poste travivis dum agrabla babilado en privata ĝardeno de sinjoro Jensche.

Dum dua tago ni visitis urbon Nürnberg. Ĉi tie akompanis nin semideanoj el E-klubo Nürnberg. Dank' al afableco kaj komplezo de niaj gastigantoj ni trarigardis historian parton de la urbo, Preĝejon de Madono, Sebaldpreĝejon, burĝon, domon de pentristo Albrecht Dürer, Oran akvuĵon, foireplacon, eĉ modernan komercan parton de la urbo. Kromordinara travivaĵo estis vizito de Metilista Korto. Tre kontentaj, kvankam lacaĵ, ni revenis al la pensiono, kie ni amuziĝis, kantis kaj babilis kune kun niaj gastigantoj.

Marde ni visitis ruinon de burgo Flossenburg kaj nian viziton ni finis per trarigardo de urbo Weiden. Malgranda urbo fondita en la jaro 1241 de reĝo Konrad la IV-a kun belaj kaj puraj stratoj, kun mezepokaj muregoj, kun ĉarma historia urbodomo. Sur la urbodomo pendis ankaŭ ĉeĥoslovaka flago, pro kontaktoj kun nia urbo Tachov. Dum la promenado la trankvila parto de historia kvartalo subite ŝanĝiĝis je vigla, vendejplena urbo. Ankaŭ tia estas Weiden.

Niaj gastigantoj estis tre atentemaj, afablaj, kompleksaj konatigi nin kun belecoj de sia regiono. Niaj junaj kaj pli aĝaj anoj praktike uzis la internacian lingvon kaj ekkonis, kion Esperanto alportas en internaciajn rilatojn. Ni ĉiuj esperas, ke niaj gastigantoj baldaŭ vizitos nin kaj niaj amikaj rilatoj disvastiĝos plu.

Pavel Nechvíle



Dum la revoluciaj tagoj en nia lando suferis multaj kvinpintaj steloj, inter ili ankaŭ la Esperantaj. La ostravaj esperantistoj zorgas pri la E-monumentoj en la ĉirkaŭaĵo: jen modelo de la stelo por la E-monumento en Bohumin. La stelon mulditan el bronzo faris en la rondeto de junaj teknikistoj s-ano Milan Neuwirth.

Junularo post 40 jaroj

En la klubejon de Praga klubo la unuan de majo posttagmeze mi venis precipe pro mia sciivolemo kaj nelaste pro la fakto, ke je la kvina la saman tagon mi planis renkontiĝi en la proksima oficejo de ĈEA kun estraranino de Unuiĝo Franca por Esperanto sinjorino Raymonde Perault.

Min atendis kortusa renkontiĝo kun gejunuloj el kvidekaj jaroj, do nuntempaj plenkreskuloj, kiuj montris sian modelan entuziasmon por Esperanto.

Marta Křenková, animo de la renkontiĝo, komencis per purigado de la koridoro. Ĉi ne apartenas al la klubo, sed tamen; ĝi donas la unuan impreson...

Ĉeestis du honoraj membroj de ĈEA - Jaroslav Mařík kaj Drahomír Kočvara, super kies kronikoj oni agrable memorigis al si la plej gravajn okazaĵojn de la movada pasinteco.

Tamen, ora punkto de la restado en la klubejo estis ĥora kantado sub gitara akompano de s-ano L. Mlejnek. Sekvante liajn belegajn pentraĵojn kun tekstoj de la kantoj ĉiuj povis facile kunkanti, senrigarde la fakton, ĉu ili memoras la tekstojn aŭ ne plu.

Sed poste mi jam traktis en la oficejo de ĈEA kun la estraranino franca pri estonta kunlaboro de niaj asocioj en formo de sendeviza intersango de libroj kaj turismaj rilatoj. La traktadon partoprenis ankaŭ la sekretario de ĈEA Z. Pluhař kaj ĉefdelegito por UEA L. Rýznar. Kaj post la traktado ni kvarope visitis la klubejon por povi almenaŭ parte ĝui la Esperantan etoson komune kun niaj "junularaj veteranoj".

Karaj ĉeestantoj de la renkontiĝo, senkulpigu min, ke mi ne konas vin ĉiujn, sed kredo, ke mi estas vere gojigita sentante, ke mi bonege utiligis la unuamajan posttagmezon enspirante de vi la poresperantan entuziasmon kaj tiamaniere ankaŭ forton al mia agado por Esperanto. Pro tio mi ege dankas al vi ĉiuj.

Petro Chrdle

Pri akademiaj esploroj kaj instruado en Bad Saarow

De la 27-a de aprilo ĝis 2-a de majo 1990 denove okazis grava seminario en la gastodomo de Kulturligo, en Bad Saarow.

Kolektigis 37 fakuloj el la akademia sfero por trakti per 24 prelegoj la temon "Esperanto - objekto de akademia esplorado kaj instruado". La partoprenintoj venis el Bulgario, GDR, FRG, Japanio, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Soveta Unio. Aparte interesa estis la prezento de la rumana akademia modelo, krei Esperanto-movadon en nacia skalo, prezentita de prof. F. Bociort, prezidanto de la nove fondita Rumana Esperanto-Asocio. (GDHEA)

Sur la kovrilo

En la E-Klubo Vítkovice s-ano Vondráková tostas kun s-ano D. Kočvara sub belega karbo-pentraĵo de D-ro Zamenhof fare de franca artisto. La bildon donacis al la klubo s-ano Milada Josková el Praha.

Rondeta vivo



Jeseník Nova Esperanto-rondeto estis fondita en Jeseník la 5-an de januaro 1990. La rondeto kunlaboras kun Esperanto-klubo "Paco" en Šumperk. La 19-an de majo okazis en Jeseník regiona kunveno de esperantistoj, dum kiu oni plantis simbolean Esperanto-arbon.

La 3-an kaj 4-an de majo 1990 visitis la distrikton Šumperk s-ano Raymond Perault el Pariza centro de Unuiĝo Franca por Esperanto kaj s-ano L. Rýznar el Pardubice. La visito havis laboran karakteron. La Jeseníkaj kaj Šumperkaj esperantistoj komune petis s-anon Perault pri perado de serioza kaj daŭra reciproka kunlaboro kun kelkaj E-grupoj en Francio, kiuj en venonta jaro (1991) povus veni Jesenikon por dek kvar tagoj por partopreni kun aliaj en aktiva helpo al montaro Jeseníky en la kadro de la III-a E-arbara tendaro VERDA HELPO. Oni preparis la kreon de "E-triungulo de reciproka kunlaboro" (Francio - Ĉeĥoslovakio - Benino). Fine s-ano Perault promesis en la jaro 1992 denove veni al Jeseník kaj Šumperk.

Adreso por venontaj partoprenantoj en Verda Helpe 1991: Stanislav Droppa, sídl. 546, 788 14 Šumperk 6. Stefan Takáč

Olomouc Jarkunveno de Esperanto-klubo en Olomouc okazis la 3an de aprilo 1990. Partoprenis ĝin 38 membroj kaj gastoj el Ostrava, Přerov kaj Prostějov. Ĝestis du membroj de CK de ĈEA, nome s-ano J. Vondráková kaj s-ano ing. K. Janouš. Kulturenmetaĵon prezentis s-ano Jan Duda, membro de Moravia filharmonio. Estis pritraktita agado de la klubo en pasinta periodo kaj ĝia laborplano por ĉi tiu jaro. El iniciato de s-ano ing. Janouš oni pridisputis ankaŭ la eblecojn de Esperanto-kunlaboro post nuligo de nunaj administraj regionoj. Estis rememorigita granda graveco de kunlaboro de mezmoraviaj esperantistoj kun esperantistoj el Ostrava-regiono en la tempo post likvido de KACSR en jaro 1952. Tial oni rekomendis daŭrigi tian kunlaboron ankaŭ en estonteco.

La jarkunveno elektis 12-membran komitaton de la klubo kaj la ĝisnunan presidenton D-ron Vladimír Mohapl decidis nomi honora prezidanto. Kiel nova prezidanto de la klubo estis dum unua komitata kunveno en sekreta voĉdonado elektita s-ano ing. František Svoboda.

La 27-an de marto 1990 visitis kunvenon de Esperanto-klubo en Olomouc s-ano J. Green el ŝtato Wisconsin en Usono.

La 10-an de aprilo venis en la kunvenon de ĉi tiu klubo grupo de junaj bahanoj, kiuj havis sian internacian renkontiĝon en Olomouc. La grupon alkondukis s-ano Alexandru Almasan el urbo Cluj en Rumanio, kiu fervore propagandis Esperanton dum la menciita internacia bahana renkontiĝo.

Dr. Mohapl

Prostějov Esperanta klubo en Prostějov, fondita la 7-an de februaro 1909 havas hodiaŭ 42 anojn. La klubanoj kunvenadas ĉium ĵaŭdon je la 18.30 h en klubejo Hlaváčkovo nám. 1, kie ili havas eblecon paroli per Esperanto pri diversaj temoj. Kvar niaj klubanoj faris asoci-

ajn ekskursojn en Olomouc. Nia Esperanta klubo ankaŭ tre bone kunlaboras kun ĉirkaŭaj kluboj en Olomouc, Vyškov, Přerov, Šumperk kaj kun nova E-klubo en Jeseník.

Jam komence de jaro 1990 komencis nia klubo aranĝi en bazaj kaj mezaj lernejoj prelegojn pri Esperanto por instruistoj. Ili volas akiri intereson ĉe instruistoj pri Esperanto kiel lingvo, kiu ili povus instrui en lernejoj. En marto reprezentanto de nia Esperanta klubo traktis en la lerneja fako de Distrikta nacia instituto kun ĉiuj lernejestroj en distrikto Prostějov pri ebleco por instruistoj ellerni Esperanton kaj poste instrui ĝin en lernejoj kiel nedeviga objekto. Direktoroj de lernejoj pridisputis tiun ĉi eblecon kun instruistoj kaj jam aligis kelkaj instruistoj, kiuj volas post la kuro instrui Esperanton en lernejoj.

Jar. Liška Vítkovice Post tridekjara laboro la E-klubo en Vítkovice finis sian agadon en la Domo de Kulturo de Metalurgia Entrepreno kaj ekde la 1-a de septembro ĝi ekaktivis kiel interesrondeto ĉe Distrikta kulturcentro en Ostrava. La kunvenoj okazas ĉiumerkrede de la 18-a h en Polifunkcia domo, Zelená-str. n-ro 30 (Verda strato n-ro 30). Ekde septembro oni gvidas du kursojn por komencantoj, unu por progresintoj kaj konversacian kurson. En la Urba domo de infanoj kaj junularo ekfunkciis rondeto de junaj esperantistoj.

La subaj fotoj montras la aktivecon de esperantistoj el Vítkovice. D. Kočvara propagandas E-on en Pardubice al tieaj logantoj. - Usona esperantisto Jakob Green kun D. Kočvara ĉe la Esperanta monumento dediĉita al J. A. Komenský. - S-ano Ludvík Chytil el Přerov rakontas pri sia vizito al Italio. - Pri la moroj en Tajlando la 18-an de aprilo 1990 rakontis Pho Thamkhajadpaikun el Bangkoko. (Fotoj de Ing. Hemerka, D. Kočvara kaj R. Wolkowinskij.)



Maja rakonto

LA BUKEDO POR HEROO

Rozkoloraj floroj de kaŝtanoj malrapide mortas en vazo. Kaj de nove ekfalis en mian animon tiu malnova tristo, kiel ĉiam, kiam mi vidas florojn de kaŝtanoj...

Tiam mi vidis lastfoje la feliĉan vizagon de fraŭlino Julie. Ŝi staris sub floranta kaŝtano kaj mi plukis, sidante sur dika branĉo de maljuna arbo, rozkolorajn kaŝtanflorojn kaj mi jetis ilin al fraŭlino Julie.

Ŝi tenis jam grandegan bukedon el kaŝtanfloroj kaj kriis: "Dankon, amiko, jam sufiĉas, nur ne ekfalu!"

Sed mi plukis kaj jetis novajn florojn kaj ĵaluzis pri feliĉa rideto de fraŭlino Julie.

Kie nur estas vi nun, mia fraŭlino Julie? Ĉiam denove, ĉiujare printempe, mi vidas vian feliĉan vizagon, kiam antaŭ nia domo floras la maljuna kaŝtano, kvankam vi certe forĝis tiun malgrandan, lentugplenan knabeton, kiu loĝis en la unua etago.

Fraŭlino Julie loĝis en tria etaĝo de nia domo. Ŝi estis unusola fraŭlino, kiun mi amis. Ŝi estis ankaŭ tute malsama, ol aliaj fraŭlinoj, kiel ekzemple mia dekkvarjara fratino Hedvika: Dum la tuta tago ŝi kantis neebajn kantojn terure falsvoĉe, pri tio, kiel "ekfalos ombro sur la parkon Petřín kaj ŝi versos larmojn de feliĉo en blankajn lekantojn". Kaj de la tempo, kiam ŝi ricevis travideblajn silkajn ŝtrumpojn, ŝi estis jam tute netolerebla.

Foje mi diris al mia panjo, ke ni povas interŝangi mian fratinn Hedvika por fraŭlino Julie. Sed panjo ridetis: "Do, saĝnas al mi, ke vi estas enamiginta! Kiam mi renkontos fraŭlinon Julie, mi devos diri al ŝi pri tio, kiel vi amas ŝin!"

Mi rugigis kaj fervore defendis min, ĉar tio estis vero. -

Fraŭlino Julie loĝis en nia domo jam ses jarojn. Jam ses jarojn daŭris la milito kaj kiam mia panjo foje parolis pri fraŭlino Julie, ŝi ĉiam aldonis: "Tiu bonega knabino! Mi deziras al ŝi el tuta mia koro, ke revenu ŝia sinjoro Vávra viva kaj sana! Kiu knabino farus tion, atendu ses jarojn?"

Kelkfoje mi demandis mian patrinn pri tio, sed ŝi ĉiam diris: "Ne demandu pri tiuj aferoj, vi estas ankoraŭ tro malgranda!"

Sed mi bone scias, ke sinjoro Vávra devis eskapi pro faŝistoj, kiuj nun ekspansiis en nia lando kaj ke fraŭlino Julie estis fianĉino de sinjoro Vávra kaj ĝis ilia edzigfesto mankis nur kelkaj tagoj. Kaj nun Julie atendis lin ĉe lia patrino, kiel ŝi tiam promesis al li.

Sed mi opiniis, ke sinjoro Vávra ne povis elekti pli malbonan lekon por tiel longa atendo. Lia patrino, sinjorino Vávrová, estis maljuna,

seka virino kun severaj, grizaj okuloj. Mi ne memoras ŝin ekrideti. Kaj Julie diris al ŝi "panjo", kvankam laŭdire ŝi havis sian veran patrinn en Ĉumava. Mi neniam povus diri al sinjorino Vávrová "panjo", kaj ankaŭ neniam mi povus logi ĉe ŝi.

Fraŭlino Julie neniam stulte demandis al mi, kiel mi lernas kaj ankaŭ neniam diris, ke mi estas tre simila al mia paĉjo, aŭ ke mi aspektas kiel mia panjo, kiel kutime netolereblaj homoj diras al ĉiuj infanoj.

Mia amikeco kun fraŭlino Julie komencigis jam antaŭ unu jaro, tiam, kiam mia paĉjo bezonis la biciklon por alporti ĉi da faruno el provinco. Veturi per vagonaro estis tiam tre danĝere, ĉar faŝistoj tiujn aferojn, kiel aĉeti farunon sen nutraĵkartoj, punis tre severe.

Mi ploris, ke mi ne povos fari ekskurson kun miaj kamaradoj. Fraŭlino Julie ĝuste iris hejmen el laboro. Ŝi ekvidis larmojn en miaj okuloj.

"Kio okazis?" demandis fraŭlino Julie afable.

Floro mi diris al ŝi ĉion.

"Mi povas prunti al vi mian biciklon, ĉu vi volas?" ekridetis fraŭlino Julie.

Kaj de tiu tempo ŝi estis por mi "mia fraŭlino Julie".

Post tio mi jam prunteprenis de ŝi ankaŭ librojn kaj mi uzis ŝian bonkorecon tre ofte.

"Kiel ŝi maljunigis!" oni diris pri fraŭlino Julie. Sed ŝi plaĉis al mi tia, kia ŝi estis. Mi ĵaluzis pro sinjoro Vávra kaj mi sekrete esperis, ke li ne revenos.

Tio estis jam unu monaton post la milito, kiam la patrino de sinjoro Vávra montris al ĉiuj la leteron de sia filo. El Anglujo.

"Li vivas! Kaj li revenas! Kaj laŭdire kumportos al mi donacon... surprizaĵon! Jes! Nur al Julie apartenos prave mia filo! Ĉu vi scias, kio estas tio, ses jarojn fidele atendi?" diris sinjorino Vávrová fiere. "Sed nun ŝi havos rekompencan! Ŝia edzo estos milita aviadisto! Heroo! Julie havas jam tridek jarojn, mia filo tridek unu..."

"Almenaŭ ili estos saĝaj geedzoj!" diris mia panjo ĝoje. "Kaj kion faras fraŭlino Julie? Mi kredas, ke ŝi estas feliĉa!"

"Ŝi tute rejunigis! Ŝi tre bezonas tion. Mia filo vidis Julie-n lastfoje, kiam ŝi estis nur dudekkvarjara. Li pensas, ke Julie estas eble jam edziniginta. Sed jam morgaŭ li vidos! Hodiaŭ Julie devas ankoraŭ viziti friziston! Sed ŝi de mateno nur ordigas kaj purigas tutan nian loĝejon! Mia kara Julie!"

Kaj sinjorino Vávrová rapide foriris en alian etaĝon, rakonti pri sia ĝojo.

Mi renkontis fraŭlinon Julie sur la korto. Ŝi ridetis per sia larĝa, belega rideto, ĉe okuloj ventumiletojn el faltoj.

"Kiam sinjoro Vávra alvenos?" mi demandis ĵaluzplena.

"Morgaŭ, mia malgranda amiko. Sed vi ne povas memori lin, vi havis nur tri jarojn, kiam li devis foriri!"

"Kaj ĉu mi povos ankaŭ viziti vin, kiam estos sinjoro Vávra hejme?"

"Kompreneble jes!" diris fraŭlino Julie feliĉe.

"Do - okaze mi povas ekpluki bukedon por li. Ĉu plaĉos al li kaŝtanfloroj?"

Ŝi kapjesis kaj mi rapide ekgrimpis inter brancojn de maljuna kaŝtanarbo. Supre bluga, printempa ĉielo kaj sube staris fraŭlino Julie kaj feliĉe ridis...

Tagon post tio, matene, mia patrino metis acetaĵon sur la tablon kaj diris mallaŭte: "Sinjoro Vávra estas jam hejme." Kaj ŝi havis larmojn en okuloj.

"Panjo - - sed kial vi ploras?" mi skriis.

"Sinjoro Vávra revenis - - sed - - ne sola. Li revenis kun sia edzino, tre juna angla knabino. Ŝi havas nur dek naŭ jarojn. Kaj ili havas jam ankaŭ knabeton, tre carman, li havas unu jaron", diris panjo, tuta en larmoj.

"Kaj fraŭlino Julie - - kie ŝi estas? Kion faras ŝi?"

Mi ne atendis respondon kaj kuris en la trian etagon. Julie nun devas iri al ni. Mia panjo certe permesos tion...

Kun batanta koro mi eksonoris. La pordon malfermis al mi sinjorino Vávrová.

"Kion vi volas?" ŝi demandis kolere. Kaj en tiu momento mi ekvidis en antaŭcambro vesthokon kun malgranda virina ruga jako el ledo ĉe blua mantelo de aviada uniformo...

"Kie estas fraŭlino Julie?" mi demandis mallaŭte.

"Ŝi foriris hejmen, hodiaŭ nokte!"

Kaj sinjorino Vávrová fermis post la historiaĵo de fraŭlino Julie la pordon.



La 21-an de marto 1990 prelegis en la E-Klubo Vítkovice D-rino Věra Barandovská pri manieroj de instruado de Esperanto. Post la prelego ŝi subskribis sian novan lernolibron "Esperanto por memlernantoj", eldonitan de Ŝtata Pedagogia eldonejo en eldonkvanto de 20000 ekzempleroj. La kurson en Vítkovice partoprenas ankaŭ 4 eksterlandanoj, inter ili Ing. Hamad Mohamed el Palestino. (Foto de Radek Wolkowskiĵ)

El fervojista historio

Trakoj al fervojstacio "morto"

Kiam falegas la ponto

Pasis jam 110 jaroj de post unu el la plej teruraj katastrofoj. La 28-an de decembro 1879 furiozis en Skotlando fortega uragano. La poŝta trajno trafikis el Edinburgo al Dundee. Kiam ĝi atingis la sudan parton de la ponto super la rivero Tay, la vento transformiĝis en orkanon. En la momento, kiam lokomotivo trovigis meze de la 75 metrojn alta ponto, la stalaj mastoj ne eltenis konstruistari fortegan blovadon de la ventego. La meza parto de la viadukto enbismigis. En akvon de la rivero Tay falis ĉiuj vagonoj kun 80 pasaĝeroj. Ĉiuj trovis tie la morton. Kialo de tiu ĉi katastrofo estis senduba. Erara konstruado de la ponto, malzorgema realigo de la projekto. Kruta ironio de la sorto estas, ke la ponto estis transdonita al trafiko kun luksega pompo nur unu kaj duonon da jaro antaŭ la akcidento.

Ĉu kulpis Ejfelo?

Ankaŭ la plej granda katastrofo en Svisio iomete similis al tiu skotlanda. Sed la pontego super rivero Birs proksime de Munchenstein falegis la 14-an de junio 1891 ne dum malbona vetero, sed dum beleĝa, sunoriĉa tago. Ekspertoj pli poste konfirmis, ke la ponto estis difekta jam de post ĝia konstruado. Kvankam ĝia konstruanto estis la fama franca inĝeniero Aleksandro Gustavo Ejfelo! Ĉu li facilanime faris eraron? La ponto super Birs, konstruita en la jaroj 1874-1875, ne estis destinita por pezaĵ ŝarĝoj, kiujn oni tie transportis en 1891. Post ekfunkciigo de la pli pezaĵ kaj pli povumaj lokomotivoj oni plifortigis transversajn latismastojn, sed tio ne sufiĉis.

La popola festo en Munchenstein, kunligita kun prezentado de la kantensembloj, altiris multajn spektantojn. Jam ekde mateno alveturigadis la trajnoj apartenantaj al fervoja kompanio Jura-Simplon centojn da pasaĝeroj. Ankaŭ al la unua posttagmeza trajno, forveturanta el Basel je la 14-a horo 15 minutoj, oni aldonis du vagonojn kun plua lokomotivo, destinita helpi transporti pligrandigitan ŝarĝon. La tuta trajno pezis 324 tunojn. Duonkilometron de la fervoja stacio Munchenstein la trajno traveturas la ponton super rivero Birs. Dek minutojn pli frue tie ĉi traveturis vartrajno pezanta 718 tunojn kaj neniu problemo aperis. Sed dum la momento, kiam lokomotivo de la pasagertajno el Basel traveturis la ponton kaj atingis jam la duan bordon, la ponto en sia meza parto disrompiĝis. Ambau lokomotivoj, la poŝta vagono, ŝarĝvagono kaj unuaj kvar pasagervagonoj falis en la riveron. La kvina vagono restis staranta rande de la trarompita ponto kaj restanta parto de la trajno su la bordo. Ekregis nepriskribebla paniko kaj teruro. De malsupre, el

riverfluo oni aŭdis vekriojn de la vunditaj pasaĝeroj, vekkriojn pri helpo. Okaze de la akcidento 73 homoj estis mortintaj kaj 171 vunditaj.

Kunpuŝigo de kvin trajnoj

Dum la unua mondmilito okazis ankaŭ la plej nigra tago de la britaj fervojoj. En Quintinshill tiam forpasis 226 homoj, ĉar realkomutisto forgesis, ke sur unu trako restis stari trajno. Postsekvoj de la forgeso estis teruraj. Kvin diversaj trajnoj, la ĵam menciita, respektive forgesita loka trajno, la vartrajno, la neŝargita karbotrajno, la milita transporttrajno kaj la nokta eksprestrajno Londono - Glasgow aperis en tiu ĉi terura kunpuŝigo. Unue la milita trajno, veturanta per rapido 110 km/h ektuŝegis la lokan trajnon, starantan sur la sama trako. Lokomotivo de la milita trajno elreliĝis kaj restis transverse staranta sur du trakoj, la vagonoj amasiĝis unu sur alia. Kun tiu ĉi amasego de feraĵo kaj malesperaj homoj koliziis la nokta londona eksprestrajno. La katastrofon pligrandigis la fajrego, aperinta kaŭze de la difektita instalaĵo de la enstacia gaslumigo. Kaŭze de tio komencis bruli ankaŭ apude staranta vagonaro kun karbo. Tiuj, kiuj postvivis la kunpuŝigon, laŭvorte ekbrulis. Forpasis 214 soldatoj kaj 12 personoj el aliaj trajnoj, tre multaj estis ankaŭ grave vunditaj.

La lokomotivisto avertis vane

En oktobro 1917 Francio sendis milittrupojn helpe al italaj trupoj, dangleigitaj fare de germanaj kaj aŭstria batalionoj. Dum decembro la situacio sur la fronto ŝanĝiĝis. Parto de la francoj ricevis permeson forveturi por libertempoj. La 17-an de decembro 1917 envagonigis en la tre longan trajnon en apudlandlima stacio Modane multaj feliĉaj, gajigitaj soldatoj. Sed lokomotivestro estis plena de duboj. La lokomotivo havis destinitajn parametrojn por tiri 144 tunojn. Sed la trajno estis troplenigita, kun homoj kaj varoj ĝi pezis sume 526 tunojn! La lokomotivestro atentigis, ke dum tiuj ĉi cirkonstancoj minacas grava danĝero dum veturo sur la abrupta deklivo al Chambery, tiom pli, ke reloĵ estis kovritaj per frostglaciindaĵo. Sed liaj atentigoj estis vanaj. Oni ordonis al trajno forveturi. La lokomotivestro malrapide, singardeme ekveturigis la trajnon. Sed poste jam nenio povis haltigi la katastrofon. Rapido de la trajno ĉiam pli kaj pli kreskis, la bremsado estis nesufiĉa, la ŝargo de la trajno trioble superis la bezonatan bremspovumon. La trajno "flugis" malsupren. Dum la sama tempo staris en fervojstacio Saint-Michel-de-Maurienne trajno plena de vunditaj soldatoj, preparita pluveturi al lazareto en Modane. En lasta momento oni ekrimarkis la danĝeron kaj la trajnon oni rapide sukcesis manovri sur alian trakon. Sed sorto de la pasaĝeroj el Modane jam estis neŝanĝebla. En unu el multaj mallargaj kurboj koliziis kun protekta muro la vagono kun valizoj, de kiu tuj poste fortirigis lokomotivo kun tendro. Je rapido 150 km/h alveturigis la vagonon ceteraj 18 vagonoj. Dum momento aperis grandega rubaĵo. Okazis nepriskribebla infero, el kiu saviĝis nur 200 homoj, 800 soldatoj ne transvivis la katastrofon! La lokomotivestro Louis Girard en la fortiriginta lokomotivo ne pereis. Oni arestis lin, sed post prijuĝo de ĉiuj cirkonstancoj la milittribunalo liberigis lin.

Antaŭkristnaska akcidento

La 23-an de decembro 1933 okazis en Francio la plej granda fervoja katastrofo en intermilita periodo. La vespera rapidtrajno Parizo-Strassbourg de malantaŭe puŝis la trajnon el Parizo al Nancy, haltigita en Pomponnes, ĉar antaŭ ĝi oni sendis sur linion la pasaĝertrajnon. La kunpuŝigo estis tiom granda, ke la ses lastaj vagonoj de la staranta trajno estis tuj ruinigitaj. La lokomotivestro kaj hejtisto de la rapidtrajno al Strassbourg asertis, ke la signalilo montris veturpermeson. Akuzo pli poste citis, ke la aserto ne estas tute vera, sed nek dum ĵugproceso nek pli poste oni tute klarigis la okazintaĵon. Dum katastrofo perdis la vivon 230 pasaĝeroj kaj pli ol duonmilo estis vunditaj.

Tragedio de la "nigraj" pasaĝeroj

En malgranda suditala montara stacioto Balvano staris la 2-an de marto 1944 du vaporlokomotivoj, preparitaj forveturigi 47 vagonojn de la vartrajno tra tunelo Armi al vilaĝo Pontenzo. La vartrajnoj estis tiutempe plenaj de nigraj pasaĝeroj. Dum tiuj ĉi malfacilaj militjaroj multaj strebis eluzi komercadon je la nigra merkato, oni sparis ankaŭ vojaĝkoston. En la vartrajno troviĝis proksimume 600 personoj! La lokomotivoj, en kiuj oni hejtis per malbonkvalita karbo, tiris longan vicon da vagonoj sur la montardeklinon nur kun la plej granda fortostreĉo. Kiam la tuta trajno enveturis tunelon, la lokomotivoj movigis lastfoje. Unutraka tunelo baldaŭ pleniĝis per sufoka fumo. La lokomotivisto, hejtistoj kaj plimulto da pasaĝeroj mortis pro sufokigo.

Teruro en la antaŭurbo

Ankaŭ postmilitaj jaroj alportis kelkajn tragediojn. Ni menci almenaŭ du el ili. La 22-an de februaro 1948 oni nevolonte rememoras en la svisa Wädenswil. Vespere de la menciita tago ĉi tien alveturis trajno, per kiu revenis el Zurĉ al Sattel multaj skiintoj. Sed la lokomotivisto erare bremsis kaj ne sukcesis bremsigi la trajnon. La lokomotivo per sesdekkilometra rapido surveturis unue la haltigilon fine de la seneliĝa trako kaj poste la domon. La katastrofon ne transvivis 22 pasaĝeroj.

La fervoja reto en Londono kaj ĝia proksima ĉirkaŭaĵo estas neordinare densa. Oni ne povas miri, ke de tempo al tempo tie ĉi okazas akcidentoj. En la antaŭurba stacio Harrow and Wealdstone okazis simila situacio kiel en Quintinshill en 1915. La eksprestrajna lokomotivo el Perth renversigis sur la apudan trakon, sur kiu ĝuste proksimiĝis la matena rapidtrajno el Londono al Liverpool. Ambaŭ lokomotivoj de tiu ĉi trajno samtempe kun partoj de vagonruinoj de kelkaj vagonoj estis post karambolo forjetitaj al perono plena de vojaĝantoj, atendantaj antaŭurban elektran trajnon. La katastrofo kaŭzis morton por 112 homoj.

Kompilis Jindřich Tomášek

Tielnomataj propraj nomoj estas vasta kvanto de vortoj, kiuj ne signas ĝeneralajn nociojn, sed unuopajn. En lingvoj, kiuj uzas latinajn literojn, evoluis kutimo skribi ilin per komencaj majuskloj skribaj kaj presaj. Nome la origina latina literaro konis nur 21 majusklojn presajn el nuna vidpunkto. Skribaj literoj kaj minusklaj presliteroj komencis ekzisti nur pli poste kaj ne ekzistas krom rusa azbuko en aliaj liter sistemoj.

Nuntempa stato estas tia, ke en latina alfabeto ekzistas kvar ĉefaj tipoj de literoj: presaj majuskloj, presaj minuskloj, skribaj majuskloj, skribaj minuskloj; la komencanta lernanto estas ellernonta ĉiujn kvar tipojn, se tiu ne suferas pro disleksio kaj disgrafio. Kaj ĉar la sonoj estas pli multaj ol 21, do estas necesaj reguloj de ortografio, kiel esprimi ĉiujn sonojn. Sed al tiuj reguloj de ortografio pro prononcado venas ankoraŭ reguloj pro uzado de majuskloj en komenco de vortoj, kiuj ne estas samaj en ĉiuj lingvoj kaj eĉ ne unuecaj en unuopaj lingvoj, ĉar oni povas diskuti pri tio, kio estas propra nomo skribenda per komencmajusklo.

En ĉiuj lingvoj, kompreneble kiuj uzas latinan kaj rusan alfabetojn, estas nepre nomoj de personoj faktaj propraj nomoj, nuntempe du, tri aŭ eĉ kvar, plue tielnomataj geografiaj nomoj, sed tie ne estas unueco, fine kelkaj aliaj.

Estas ĉefe du problemoj: ĉu Esperantigi ilin, per tradukado aŭ nur per adaptado, ĉu skribi majusklojn, precipe se temas pri diferencaj konceptoj en diversaj lingvoj. Ĉiu Esperantigo estas pliriĉigado de vortotrezoro, do se validas, ke vortaro de Esperanto havis 800 radikojn, do nun vortaroj havas 800 pagojn, kio estas argumento kontraŭ facileco. Oni ja diras, ke lingvoj havas eĉ 200 000 vortojn, sed tiu nombro estas dubinda kaj nepre neutila, ĉar oni povas utiliĝi plej multe dekonon. Krome Esperanto povas aserti, ke en ĝian trezoron apartenas latinaj vortoj, same kiel la aliaj lingvoj kalkulas en tiun nombron ĉiujn vortojn iam uzatajn.

Nomoj de personoj plej ofte ne estas tradukataj. Iuj esperantistoj strebas traduki antaŭnomojn, iuj eĉ familiajn nomojn, ili asertas, ke tiel faris gravaj personoj en la meza epoko, ankau greka kaj latina lingvoj tradukis aŭ adaptis kelkajn nomojn. Nome Esperantigo estas avantaĝa, ĉar oni povas eluzi la Esperantan gramatikon, sed eĉ tio gvidas al problemoj: unue oni preferas nur kelkajn antaŭnomojn, ekzemple kristanajn, due oni hezitas en kazo de virinaj nomoj: ne taŭgas ĉiam la Esperanta sufikso: Jozefo, Jozefino, iam ne estas duopoj, ekzemple virinaj nomoj Eva, Věra, Brunhilde, Nataša, Nasta. En kazo de "Mario" estas tuj riproĉo de Okcidentalistoj, kiuj opinias la finaĵon de substantivo vira. Iam aperadis gazeto "Gepatroj Esperantistaj", kiu proponis por viraj antaŭnomoj finaĵon o, por virinoj a. Sed tio estis kontraŭ nia gramatiko, a estas finaĵo de adjektivo, do oni tiel forigis la facilecon de vortformado, krome virinoj povas senti sin ofendataj, ĉar adjektivo estas laŭ etimologio "io aldonita, apuda". Tial estas Esperantistoj, kiuj rifuzas Esperantigi nomojn de personoj. Iu franco skribis "Charles de Gaulle

ne estas Karlo de Gaŭlo", nia Esperanta gazeto skribis antaŭ 1950 "Ĉe tiaj personoj, kiel Jan Masaryk, Gottwald ne estas necesaj tradukoj de antaŭnomoj".

Alia afero estas geografiaj nomoj. Kelkaj estas nepre tradukendaj, ekzemple nomoj de ŝtatoj kaj landoj, oceanoj kaj maroj, sed aliaj ne estas tiel gravaj. Sed estas necesa certa kompromiso. Ekzistas urboj, kiuj origine ne estas skribitaj en latinaj literoj, do tiuj nepre estas tradukendaj aŭ lasendaj en latina transskribo, kiu ja ne estas bildo de prononcado en multaj lingvoj. Do eĉ urboj, kiuj estas en lingvoj skribataj per latinaj literoj, ne estas en Esperanto facile uzeblaj, ĉar oni skribas "Newcastle", sed nur angloj scias, ke tio estas legata "Njukhesle". En ĉeĥa lingvo aperis antaŭ 50 jaroj vortoj "football, wolleyball", sed nun ili estas ĉefigitaj laŭ ĉeĥa ortografio kaj oni nun skribas kaj legas "fotbal, volejbal", eĉ se angle tio estas prononcata alie. Kelkaj Esperantistoj Esperantigas nomojn de urboj, en kiuj estis UK, aliaj Esperantigas nomojn de ĉefurboj kaj aliaj gravaj urboj, sed en la vorto "gravaj" estas ĝuste tendenco al kulturo kaj al ties preferado. Por ĉeĥoj estas gravaj urboj kun 200 000 loĝantoj, por ĉino temas preskaŭ pri "vilagoj". Sed Esperanto estu neutrala, tial preferado de ĉia ajn kulturo povas esti malvalorigo de alia. Nuntempe eĉ aperas ŝtatoj, kiuj estas negravaj laŭ vidpunkto de mezeŭropano, sed se oni decidis ŝtatojn Esperantigi, tial oni nepre konsentu kun tiu pliriĉigo de vortotrezoro. En afero de urboj estas la situacio diferenca. Iam la nomo estas eĉ tradukebla, ekzemple "Kaba urbo", sed tamen kelkaj Esperantistoj skribas "Cape Town" aŭ "Kapstadt", alitempe oni eĉ ne scias, kiel traduki, ekzemple "Kijevo". Rusoj diras Kijev, dum ukrainoj, kies ĉefurbo ĝi estas "Kyjiv". Kaj eĉ en azbuko ne estas nomoj skribitaj same.

Eĉ en nomoj de ŝtatoj aperas problemoj. La ideo de Zamenhof longe ne validas plu, la sufikson -ujo oni tuj rifuzis, ĉar iuj opinias, ke temas pri ia "skatolo". Do tuj aperis neoficiale sufikso io aŭ dua radiko "lando", sed en kazo de Finnlando oni tuŝis la principon de Esperanto, ke duoblaj literoj en vortoj ne ekzistas krom kazoj mallonga, mallarĝe, astronomiisto, sed tie ili estas ĝustaj. Tial aliaj proponis "Suomio", kiu de ceteraj estis opiniata teruraĵo, ĉar ke Finnlando nomiĝas en finna lingvo "Suomi" scias nur finnoj mem kaj filatelistoj. Oni protestus, ke same povus esti Ĉeĥoslovakeno aŭ Ĉunkuo anstataŭ Ĉeĥoslovakio kaj Ĉinio. En lasta tempo aperis mondmapo de la mondo kaj poŝatlaso, kiuj solvas la problemojn, sed ĉu por ĝenerala kontento, ne estas certe. Se oni uzas proprajn nomojn neesperantigitajn, do oni solvas problemojn, kiel noti prononcadon kaj kiel uzi Esperantan gramatikon. En kazo de n-finaĵo oni povas aŭ uzi tiun finaĵon al la fino kiel -n: Mi vizitis Poděbrady-n, Kolín-on kaj Zámuky-n aŭ oni uzas la prepozicion "je". Mi vizitis je Poděbrady, Kolín kaj Zámuky. Problemo de 'en' do estas solvebla. Mi estas en Berlin, mi vojaĝas por Berlin. En aliaj kazoj de prepozicioj ne estas la distingado de la direkto tiel grava. Krome estas rekte direktaj prepozicioj AL, ĜIS, TRANŜ. Tial Ido, kiu limigis la uzadon de akuzativa finaĵo al kontraŭa ordo de vortoj, uzas por esprimi ĉeĥan DO la kunigon "aden", en Ido ne estas AL sed AD. Ĉeĥaj V kaj DO estas distingeblaj, dum germana lingvo havas nur IN. En ĉeĥa lingvo V kun akuzativo estas escepto: Věř v Boha, Neuved


nás v pokušení. En germana lingvo estas normale: in der Stadt, in die Stadt, in der DDR, in die DDR, in den Wald, in dem Wald, sed in Berlin, ankaŭ zu Berlin, nach Berlin. Esperanto en kazo de normalaj substantivoj uzas: en arbaro, en arbaron, en urbo, en urbon, sed kiel "en Kolín". Tio estas nur "V Kolíně", "Do Kolína" iuj diras "Al Kolín", aliaj "En Kolín-on" eble aperis eĉ laŭ Ido Alen Kolín, mi proponas "Por Kolín".

Aliaj prepozicioj: sur, antaŭ, malantaŭ, apud, super, inter ne estas plu tiel gravaj. Sendube bone uzas ilin nur germanoj kaj slavoj laŭ siaj lingvoj. Sed en aliaj lingvoj tiu senco pri direkto ne ekzistas. En franca lingvo oni diras: le livre est sur la table, je mets le livre sur la table, Esperante: la libro estas sur la table, mi metas la libron sur la tablon. Dum diskutado en Lančov svedino demandis min, ĉu estas alia senco, se oni diras: mi metas libron sur la tablo. Mi hezitis kaj klarigis: en tiu kazo mi supozas, ke mi mem staras aŭ situas sur la tablo kaj metas libron. Kaj la svedino finis la diskuton per demando: Kaj ĉu tia situacio estas ebla aŭ logika?

Al tiu konstato gvidas la trotaksado de kelkaj reguloj, se aliaj lingvoj ne havas ilin. Kaj obstina akcentado nur de unu vidpunkto gvidas al polemikoj kaj eĉ al fanatikeco. Oni estu tolerema kaj pripensu, ke la ĉefa celo de la parolado estas interkomprenigi kaj ne polemiki. Kaj polemiko, kiu ne gvidas al kompromiso, gvidas al fanatikeco kaj malamikiĝo. Kaj en kazo de propraj nomoj kaj uzado de majuskloj la kompromiso estas necesa. Ekzemple estas regulo, ke nur ĉe propraj nomoj estas komencaj majuskloj. Sed aperas grafika aranĝado, kiu entute ne uzas majusklojn. Altempe oni uzas alterne majusklojn kaj minusklojn presliterojn. En aliaj gazetoj aperas en surskriboj ĉiuj vortoj kun komencaj majuskloj. En germana lingvo estas ĝis nun ĉiuj substantivoj kun komencaj majuskloj, do se tio estus enprenita en Esperanta teksto, oni ja povus tion toleri. Cetere temas pri pure ekstera afero. La homoj estas diversaj kaj ne ŝatas ekzemple librojn, en kiuj estas fremdaj propraj nomoj. Sed Esperantistoj certe ne estas tiaj, ĉar ili ja ne estus Esperantistoj. Kun samlingvanoj ili ne bezonas Esperanton. Kaj kontaktante kun alilingvanoj ili ja respektos ankaŭ iliajn morojn kaj manierojn. Alie ili ne estas Esperantistoj. Kaj ĉiu Esperantisto enportas per uzado de Esperanto siajn manierojn kaj kutimojn. Oni strebu nur, ke ili estu tolereblaj. Do refoje gravas kompromiso.

La Jan de junio 1990 en la kadro de Ĉefa Esperanto-Asocio estis renovigita la aktiveco de sekcio KEELI (Kristana esperantista ligo internacia), kies prezidento estis elektita d-ro R. Horáký, kasisto P. Polnický, sekretario J. Šperling. Ĉiuj kristanoj estos bonakceptataj. La kotizo estas libervola. Aligilon sendos al vi J. Šperling, Heydukova 11, 180 00 Praha 8. J.Šp.

Veterana Esperanto-Klubo ĉe ĈEA fondita. Aligi povas ĉiu, kiu 40 jarojn seninterrompe aktivas en la movado, sed ankaŭ 30-jaraj aktivuloj povas fariĝi "kandidatoj". Aligilojn akceptas: Linhart Rýzmar, Na Okrouhlicku 953, 530 03 Pardubice.



el la mondo

Nova domo de E-kulturo en Plovdiv

En Plovdiv al la esperantistoj estis disponigitaj du apartaj domoj, kiuj post kelkajara riparlaboro hodiaŭ formas tutan komplekson - Domo de Esperanto-kulturo - ĉe strato "Maksim Gorkij" 13. La ĉefa parto de la komplekso ampleksas salondon por 100 personoj, kie okazos kunvenoj, prelegoj, renkontigoj k.a. aranĝoj, kaj en la kaletago - beligan modernan klubejo-kafejon. En la apuda malgranda ĉambro de la kancelario de la estro oni povas okazigi ankaŭ kursojn de Esperanto por malmultnombraj grupoj de 10 - 15 personoj. En la stratangula domo troviĝas biblioteko-legaĵo, malgranda salono por instrulaboro kaj prelegoj kaj kancelario de la departementa organizanto de E-agado.

La 27-an de oktobro 1989 okazis la solena inaŭguro de la Domo de Esperanto-kulturo en Plovdiv en ĉeesto de pli ol cent esperantistoj kaj gastoj el la urbo kaj la distrikto, reprezentantoj de la Centra Estraro de BEA, de amas komunikiloj k.a.

Imitinda iniciatemo

En Polaki Trâmbeŝ antaŭ jaroj fondiĝis tute nova Bazo por Teknika Evoluado kaj oni oficigis s-anon Ĥristo Manolov tradukisto. Mankie la ajn informo materialo, internaciaj kontaktoj, tradicioj. Per helpo de alilandaj esperantistoj li sukcesis kontaktigi kun necesaj alilandaj firmaoj kaj efektiviĝi konkretajn interkonsentojn, havigi la katalogojn de preskaj ĉiuj internaciaj teknikaj foiroj kaj riceigi la informojn pri la merkato. Unu el la rezultoj estis la persona vizito de firmaaj reprezentantoj el Nederlando, Italio k.a. Komencinte de nulo post 7 jaroj la entrepreno jam havis pli ol 18000 teknikajn prospektojn, katalogojn, proponojn.

(Bulgara Esperantisto 1/1990)

Nova Esperanta arbareto

En sia kunveno esperantistoj el E-societo "D-ro Stojan Vasiliev" - komunumo "Krasno selo", akceptis la proponon de ing. Janko Lalov, ke ĉiu esperantisto

plantu minimume po 5 arbojn. La societo alvokas ĉiujn esperantistojn en la lando sekvi ties eksemplon, por ke tio farigu tutpopola agado.

La 19-an de novembro 1989, helpe de Direkcio de Macia Parko "Vitoŝa", la esperantistoj el la societo faris forstan laborbrigadon en loko "Planinica". Malgraŭ la malvarma vetero, ĉiuj laboris kun granda entuziasmo kaj plantis 200 pinetojn. Ĉiuj brigadanoj elmontris desiron en la printempo de 1990 denove organizi brigadon por buti la pinetojn, kaj ankaŭ forstumi la ceteran parton de la loko. Oni nomis ĝin "Esperanta arbareto".

(Bulgara Esperantisto 2/1990)

E-kurso en la Pekina Radio-instituto

Komisiito de la Ĉina Esperanto-Ligo, Radio Pekino, Internacia Libro-Komerc Kompanio de Ĉinio, Redakcio de "El Popolo Ĉinio" kaj Ĉina Esperanto-Eldonejo, la Pekina Radio-instituto ekfunkciigis Esp-kurson la 28-an de septembro 1989 en sia fremdlingva fakultato. Antaŭ 20 jaroj la instituto funkciigis similan kurson kaj elkulturis profesiajn esperantistojn. La nuna Esp-kurso havas 12 lernantojn el la instituto. Ĝi daŭros du jarojn. La lernantoj studas, krom Esperanto, ankaŭ la internacian ĵurnalistikon. Post du jaroj ili laboros en la supre menciitaj organizoj.

La kursanoj deziras korespondi kun samideanoj de ĉiuj landoj pri literaturo, ĵurnalismo, radiodisaudigo kaj E-movado. Skribu al: Esperanta kurso, Pekina Radio-instituto, Dingfushuang, 100024, Beijing, Ĉinio.

Ĉina Societo de E-Instruado en Superaĵ Lernadoj fondita

De la 29-a de oktobro ĝis la 2-a de novembro 1989 en la urbo Suzhou Esperantaj instruistoj el la Pekina Instruista Universitato, Ŝanhaja Fremdlingva Instituto, Ŝandong-a Universitato, Xi'an-a Fremdlingva Instituto kaj aliaj 11 altlernejoj okazigis kunvenon de E-instruado, faris akademian interŝanĝon kaj fondis

la Ĉinan Societon de Esperanto-Instruado en Superaĵ lernejoj. La kunvenon ĉeestis ankaŭ Jiang Miaorui, estro de la Departemento de Altiernaĵa Edukado sub la E-duka Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko, kaj reprezentantoj de la Ĉina Esperanto-Ligo, Radio Pekino, Ŝanhaja Eldonejo de Fremdlingva Instruado kaj Ŝanhaja Fremdlingva Eldonejo de Sci- kaj Bildbendoj. (El Popola Ĉinio 2/1990)

Asia Konferenco de Esperanto-Instruado

De la 6-a ĝis la 10-a de novembro 1989 okazis en Manning, Ĉinio, la Asia Konferenco de Esperanto-Instruado kune okazigita de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILIEI) kaj Guangxi-a Nacioplurmulta Universitato de Ĉinio. Ĉin partoprenis ĉ. 40 esperantistoj el Japanio, Sud-Koreio, Sovetio, Svedio, Belgio, Usono kaj Ĉinio, inter kiuj estis s-ro Symons Edward, prezidento de ILIEI, kaj s-ro So Gilsu, estrarano de UEA. Dum la konferenco oni faris akademian interŝanĝon, projekciis Esperanto-instruan filmon. S-ro Symons prezidis Esperanto-ekzamenon kun internacia normo. Post 8-hora ekzameno, 15 sukcesintoj akiris diplomon donitan de UEA kaj ILIEI. La konferenco estis utila al la Esperanto-movado de Ĉinio kaj Azio.

Esperanto en la Ĉina Televido

Ekde la 5-a de oktobro 1989, la Qingdao-a TV oficiale elsendis la Esperanto-instruan filmon "Espero". Ĉ. 2000 homoj aĉetis la lernolibron kaj bildbendon por la lernado. Por elsendo de la filmo "Espero" en Qingdao, la Qingdao-a Esperanto-Asocio kaj la Qingdao-a Kompanio de Poŝtmarkoj kune faris memoran koverton kaj stampilon.

Novaj laboristaj kantoj helpe de Esperanto

La Esperanto-societo Scienoteknika Eksploato Korporacio "Verda Stelo" de la Nord-oriento de Ĉinio, la Tutlanda Federacio de Laborista Sindikato de Ĉinio kaj la Ĉina Muzikista Asocio kune iniciatis konkurson pri novaj laboristaj kantoj junio de 1989 kaj publikigis la rezulton decembro en la sama jaro. La kantoj "Kamela Urbo", "Kie Printempo?" k.a. estis premiataj. La 20 000 juanoj elspesitaj de tiu konkurso estis liveritaj sole de la

Esperanto-societo "Verda Stelo". La konkurso estas utila por disvastigi la influon de Esperanto en Ĉinio.

Zamenhofa festo en Pekino

1989 estis la 130-a datreveno de la naskigo de d-ro Zamenhof, kultura eminentulo kaj kreinto de Esperanto. Antaŭtagmeze de la 15-a de decembro ĝin festis pli ol 400 personoj el la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj, Ĉina Komitato de Unesko, Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), Pekina Esperanto-Asocio, Radio Pekino, Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio (STEA) sub la Ĉina Akademio de Sciencoj (ĈAS), Redakcio de El Popola Ĉinio kaj aliaj 9 organizoj. La kunvenon ĉeestis ankaŭ Lu Jiaxi (Lu Ĝiaĵi), vicprezidento de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliga Konferenco kaj honora prezidento de STEA sub ĈAS; Ma Bin, vicdirektoro de la Ekonomia Centro de la Ŝtata Konsilantaro kaj honora konsiliano de la Pekina Esperanto-Asocio; Chen Haosu, vicministro de la Ministerio de Radio, Filmo kaj Televido; Jelezo, honora prezidento de ĈEL kaj honora membro de UEA; Chun-Chan Yeh, vicprezidento de ĈEL, honora membro de UEA kaj fama ĉina verkisto; s-ro William Auld, fama brita esperantisto kaj poeto, kaj lia edzino; profesoro Tabor, usona esperantisto; kaj s-ino Jefremova, sovetunia esperantistino. La kunvenon prezidis Chai Zemin, vicprezidento de la Ĉina Popola Instituto de Eksteraj Aferoj kaj honora konsiliano de la Pekina Esperanto-Asocio.

25-jara jubileo de Esperanto en Radio Pekino

La 19-an de decembro 1989 oni soleme celebris la 25-an datrevenon de la Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino en ĝia domo. En la komenco Radio Pekino elsendis al Eŭropo Esperantajn programojn nur dufoje ĉiusemajne. En 1965 ĝi aldonis elsendon al nordorienta kaj sudorienta Azio. Ekde oktobro 1979 ĝi elsendas ĉiutage. En 1980 ĝi aldonis elsendon al Latinameriko. Nun ĝi elsendas 4-foje ĉiutage.

(El Popola Ĉinio 3/1990)

La landa jarkunveno en Israelo

La 13-an de decembro 1989 vespere okazis en Tel-Avivo la ĉiujara "duobla" evento de la israelaj esperantistoj: la solenaĵo por celebri la 130-an datrevenon de la naskigo de D-ro L. L. Zamenhof kaj tuj poste la landa jarkunveno de Esperanto-Ligo en Israelo. Ĉeestis ĉ. 80 esperantistoj, lernantoj kaj gastoj. La unua evento, aranĝita kaj gvidata de Matilda Landau, inkludis prelegojn kaj artan parton. Mark Steinberg prelegis hebreu pri D-ro Z. kaj Esperanto. Li rakontis interalie kelkajn interesajn kuriozaĵojn ligatajn al Esperanto. David Mager, per sia tre riĉa Esperanto, paroladis pri similecoj inter Esperanto kaj la hebrea lingvo. Li komparis la internacian lingvon kreitan de la judo Eliezer (Lazarus) Zamenhof al la "interjuda" lingvo revivigita en la sama epoko de Eliezer Ben-Jehuda.

Post kuko kaj suko venis la pli "serioza" parto: la landa jarkunveno de ELI. En ĝia kadro D-ro A. Wandel, la prezidento de ELI, raportis pri la ĝenerala agado de la Ligo. La kasisto A. Faklieru raportis pri la financoj de ELI. Raporton pri kursoj de Esperanto faris J. Murĵan. J. Tilleman rakontis pri la agado en Hajfo (la "Norda grupo") kaj pri UEA. Poste okazis debato pri diversaj temoj. Al la nova komitato de ELI estis elektataj 12 personoj: A. Faklieru, M. Karpati, M. Landau, I. Levin, D. Mager, J. Murĵan, E. Salzmann, J. Semer, C. Solt, J. Tilleman, A. Wandel. La kunvenon prezidis Norman Berdicevski.

(Israela Esperantisto 104/1990)

Nova firmao "Pres-Esperanto" en Bulgario

Bulgara Esperantista Asocio kreis novan firmaon, kies nomo estas "Pres-Esperanto". Ĝi okupiĝas pri eldonado de Esperanto-periodaĵoj (Bulgara Esperantisto kaj Panoramo-Esperanto), libroj, lernolibroj, lernohelpiloj kaj reklamaĵoj pri la Internacia Lingvo kaj komerco (en- kaj eksterlande) per ili; peranteco rilate la distribuadon en Bulgario de eksterlandaj E-produktaĵoj (eldonaĵoj, muzik-kasedoj k.a.); pres-servoj al entreprenoj kaj civitanoj; produktado de esperantaĵoj (poŝtkartoj, kasedoj, memoraĵoj, mapoj

glumarkoj, flagetoj k.a.). La gvidorgano de la firmao estas Gvidkonsilantaro kun prezidento Venelin Mitov - ĵurnalisto, kaj membroj: Emil Donev - prezisto, kaj Nikolaj Kuzmov - juristo. Ĝenerala direktoro de la firmao estas Maria Jankova - ĉefredaktoro de la Unuigita Redakcio de BEA, kontrolanto de la firmao estas Nikolaj Milev - estro de la Financa Pako de BEA.

(Bulgara Esperantisto 4/1990)

La ĉina turismo

De post sia fondiĝo en julio 1989, la E-Turisma Sekcio de la Pekina Tian'an-a Turisma Servo aktive kontaktigas kun en- kaj eksterlandaj E-organizoj. Lastatempe ĝi kaj la redakcio de El Popola Ĉinio interkonsentis kune organizi legantojn de EPC kaj aliajn eksterlandajn esperantistojn vojaĝi en Ĉinio. Krom en- kaj eksterlandaj turismaj grupoj kaj individuoj la turisma servo ankaŭ akceptas diversfakajn rondojn, konferencojn kaj turistojn kun aparta itinero kaj donas al ili diversajn servojn, kiaj kultura kaj teknika interŝanĝo, vizito k.a. Ĝi servas al turistoj ankaŭ per kuragado kaj lernigo de usuo, ĉigongo, masago kaj akupunkturo. La turisma servo donas al esperantist-turistoj 10-20 % da rabato. Interesatoj bv. turni al s-ro Zhu Baohua, N-ro 8 Dongshimen Nandajie, CN-100027, Pekino, Ĉinio.

Novaj poŝtaj stampoj en Ĉinio

La 15-an de decembro 1989, la poŝtoj de Pekino, Lhasa, Changsha, Ningbo, Qingdao, Nanchang, Changahu kaj aliaj 13 urboj faris Esperanta-ĉinajn stampojn kaj iuj el ili emisiis Esperantajn memor-kovertojn, memore al la 130-a datreveno de la naskigo de Zamenhof. - Por memori la 50-an datrevenon de la skribo de la vortoj de Mao Zedong por la Esperanta Ekspozicio en Yan'an, la poŝto de Changahu faris Esperantan stampon en la 9-a de decembro, 1989.

(El Popola Ĉinio 4/1990)

Esperanto por ĉinaj akrobatoj

Luo Zhijun, ĉefa aktorino de la Jiannanchun-a Ĉigong-akrobata Ensemblo de Sichuan-provincio, eklernis Esperanton

en 1983. Por diavastigi la praktikan kampaĵon de Esperanto, tiu ĉi ansemla desiras kontakti kun Esperantaj organizoj kaj fari kulturajn interaĝojn per Esperanto.

E-kurso en soveta revuo.

Dum 1989 en la ŝtata soveta revuo "Popola Kreado" oni publikigis 12 lecionojn de Esperanto. Aŭtoroj de la bonkvalita kaj bonstila instrumaterialo estas Natalija Ŝoroĥova kaj Andreo V. Orlov, prezidento de la Fondaĵo de Esperantistaj Junularaj Arangoj, kiu estas sola E-organizo en USSR, posedanta rajton de jura personeco kaj havanta kontojn en bankoj. Ĉiu numero de la revuo enhavas kelkajn malgrandajn fleksablajn disketojn. 4 el ili oni produktis en Esperanto.

Stipendio Ivo Lapenna

La plenumkomitato de Fondaĵo Ivo Lapenna decidis starigi Stipendion Ivo Lapenna. La stipendio estas atribuita ĉiun jaron aŭ ĉiun duan jaron al la aŭtoro de la plej bona scienca testo (dissertacio) sur la kampo de interlingvistiko kun rilato al Esperanto, akceptita oficiale en universitato aŭ samranga alta lernejo. Detala regularo estas ellaborita baldaŭ. (El Popola Ĉinio 5/1990)

Esperanto en datumbanko

De la 20-a de decembro 1989 ĉiuj logantoj de Francio povas informi pri Esperanto per la telefon-datumbanko Minitel. Unuigo Franca por Esperanto prizorgas sep rubrikojn por la servo: kio estas E-o, kie kaj kiel lerni ĝin, tutmonda korespondado, internacia turismo, renkontigoj kaj arangoj, lingvostagoj, korespondaj kursoj.

Nova estraro de OEK

Meze de januaro okazis elekto - per sekreta voĉdono - de nova estraro de OEK. La pestonon de prezidanto transprenis d-ro Donald Lötsch, renoma lingvisto en la fakoj lingvopolitiko kaj slavistiko, kiu ankaŭ kungvidis la rondan tablon pri interlingvistiko de la lasta Monda Kongreso de Lingvistoj. Lia lingvisto-kolego d-ro Detlev Blanke reelektigis kiel ĝenerala sekretario per 35 voĉoj el 36.

Nova prezidento de PEA

UEA-vicprezidento Roman Dobrzański proponis forlasis la prezidantoon de Pola E-Asocio en la lastatempaj elektoj. Ĉar ne troviĝis alia kandidato, E-radisto kaj akademiano Andrzej Pettyn okupas tiun postenon. Vicprezidentoj fariĝis lingvisto Ryszard Rokicki kaj la astro de Esperantotur, Andrzej Grzębowski. Ĝenerala sekretario estas Wiesław Tomaszewski. La 15-persona estraro enhavas i.a. novan deputiton de la Pola Parlamento, s-inon Wanda Sokolowska.

Esperanto-muziko en Zairio

En Zairio aktivas minimume tri Esperantaj muzik-grupoj je duon- aŭ plene profesia nivelo. La grupon en Kisangani gvidas Lufimpu Lukolama, en la grupo de Boma ludas Mafuila-Tunga Mayomo. La grupo "Universo" en Kinŝaso laŭ instigo de Tufuene Mafuila ŝanĝis sian nomon al "Esperanto-Muziko", signale la fakton, ke ĝi nun kantas plejparte en Esperanto. Ĉiuj tri grupoj desiras disvastigi sian muzikon pere de sonbendoj, kaj bonvenigas kontaktojn kun alilandaj muzikistoj.

Vivjubilao de s-ino von Waldowski

La 1-an de decembro 1989 s-ino Margareta von Waldowski, esperantisto el Bonn, FRG, festis sian 100-an naskiĝtagon. Membroj de Germana E-Asocio, inkluzive de ties prezidanto Wolfgang Schwanser, vizitis por gratuli ŝin. S-ino von Waldowski partoprenis en la 13-a Universala Kongreso en Prago, 1921, kaj dum multaj jaroj estis aktiva movadano en Berlino.

(Esperanto 2/1990)

E-literaturo en la pola lingvo

La pola monata revuo Literatura na Świecie (Literaturo en la mondo) publikigis en sia numero 8-9/1989 centpagan materialon dediĉitan al Esperanto. La E-literaturon reprezentas poemoj de William Auld, Albert Goodheir, Kris Long, Baldur Ragnarsson kaj du prozaĵoj de Endre Tóth. Inter ili elstaras la tradukaĵoj el W. Auld ("La infana raso" I kaj IV, "Anna"), per kiuj Roman Kwiatkowski venkis antaŭ kelkaj jaroj en konkursa pri poligo de Esperantaj poemoj. La tradukajn specime-

nojn prikomentas eseej de Vilmos Bencsik ("Teoriaj problemoj de la Esperanto-literaturo"), Kris Long (artikolo pri la evoluo de la poezio), Wojciech Usakiewicz (skizo pri la prozo). La tuton kompletigas kumetaĵo farita el intervjuoj kun Esperantaj verkistoj. Al la realigo de tiu projekto kontribuis kiel tradukintoj: Tomasz Chmielik, Jan Kos, Roman Kwiatkowski, Izabela Sawoyka, Barbara Sokalówna, Wojciech Usakiewicz kaj ankaŭ Kris Long, kun la subteno kaj helpo de kelkaj aliaj personoj. La revuo disvendigis rapide, ĉar en la sama numero ĉeftemis la verkaro de Václav Havel.

Alfabetigo pere de Esperanto

La 12-an de januaro, kadre de la 27-a Aŭstralia E-Kongreso, okazis seminario pri la temo "Esperanto kaj internacia legipovo". Kontribuis i.a. Ralph Harry, Trevor Steele, Vera Payne, K. Enderby kaj Nick Nicholas, kaj partoprenis ankaŭ kelkaj oficiistoj de la Aŭstralia UN-Asocio. La seminario konkludis, ke Esperanto faciligas ne nur la lernadon de legado kaj skribado, sed ankaŭ la akiron de tutmonda kultura legipovo. Ĝi rekomendis, ke esperantistoj pliprofandu sian propran legipovon dum internacia Alfabetiga Jaro, legante almenaŭ unu libron monate.

Ĝurpaĵo Verduloj kaj Esperanto

La eŭroparlamenta grupo Ĝurpaĵo Verduloj estas la sola, kiu diskonigis sian programon ankaŭ en Esperanto okaze de la lasta baloto. Ĝia sekretario Leo Cox nun konfirmas, ke ĝi bonvenigas ĉiujn informojn pri ekologiaj problemoj kaj okazaĵoj, ankaŭ en Esperanto. Sendu tiajn tekstojn, laŭble klarajn kaj dokumentitajn, al li ĉe Ĝurpaĵo Verduloj, Europa Parlamento, Belliard-str. 97-113, B-1040 Bruselo.

Oraj Najtingaloj kun Ora Noto

La slovaka rokgrupo Team, kiu koncertis de la pasintjaraĵ LJK kaj UK, venkis en la du plej gravaj ĉeĥoslovakaj muzikaj enketoj, de la publiko (la Ora Najtingalo) kaj de la kritikistoj (la Ora Noto). Krom regulaj enlandaj turneoj, la grupo preparas sian trian grandan diskon, ricevis inviton al pluraj mondaj muzi-

kaj festivaloj, kaj faris kontraktojn kun anglaj sondiskaj kompanioj.

Tradukado aŭtomata

Sub aŭspicio de la kooperativo "Nauka" (Scienco) en Irkutsk, Siberio, esplorgrupo ellaboris prototipon de duon-aŭtomata traduksistemo por personaj komputiloj. La gramatika analizo de la sistemo basigas sur la strukturo de Esperanto. Por pliaj informoj kontaktu Jurij Vajnapel, str. Baŭmana 252-52, SU-664053 Irkutsk.

(Esperanto 3/1990)

E-filatelaj Ekspozicio

La 2a Esperanto-Filatelaj Ekspozicio okazis en la ĉiovendejo Hyundai inter la 14a kaj 20a de oktobro 1989. Korea E-Asocio okazigis ĝin sub la aŭspicio de la granda ĉiovendejo, kien vizitas tre multaj homoj. Dum la ekspozicio la ĉiovendejo preparis Esperanto-samajnon, por kio ili aranĝis ekspozicion pri aliaj esperantaĵoj: libroj, insignoj, glumarkoj kaj prelegon pri kuba vojaĝo de prof. d-ro So Gil-su. Des pli notindis la fakto, ke oni aranĝis la kurson de Esperanto post la ekspozicio en la nomo de la ĉiovendejo.

Prelego pri Eŭropa Vojaĝo

Lee Jung-kee, la ĝenerala sekretario de KEA, prelegis pri sia eŭropa vojaĝo, invitive de 6 E-kluboĵ de universitatoj tra la tuta lando. Okaze de LJK kaj UK en 1989 li eŭropvojaĝis ĉe ne tiom alt-koste dank' al tieaj esperantistoj. Nuntempe el universitatoj multigas tiuj, kiuj interesiĝas pri eksterlanda, se monda vojaĝo. Do Esperanto-kluboĵ invitis lin kaj li, prezentante diapositivajn filmojn, emfazis, ke Esperanto estas tre utila por eksterlanda vojaĝo.

Sporta Konkursao

Junaj esperantistoj en la urbo Taejon (Korea Respubliko) havis sportan konkurson la 29-an de oktobro 1989. La konkurso okazigis Unuigintaj E-Kluboĵ de tieaj Universitatoj. Okaze de ĝi partoprenantoj inter si plifortigis la amikecon kaj solidarecon. (La Espero el Koreio, n-ro 6/1989)



En la lernojaro 1989-90 sukcese finis la vesperan kurson
en Prago ĉs kursestro Ing. Veselý jenaj gekursanoj:

PhDr. Jaroslav B o u b i n , Husovo nám. 8, Plzeň, 301 00
Stanislava D u ŝ i ŝ k o v á , Sekaninova 52, Praha 2, 128 00
PhDr. Eva F i a l o v á , Střimelická 2497, Praha 4, 141 00
Dagmar H o r e l o v á , Mařatkova 915, Praha 4, 142 00
Dana H y n k o v á , Vozníkových 34, Praha 8, 180 00
Marie K o l m a š o v á , Čihákova 38, Praha 9, 190 00
Marta K o t y k o v á , Kubišova 6, Praha 8, 182 00
Dagmar K u r k o v á , Jasmínová 2885/33, Praha 10, 106 00
Ing. Stanislav M a g n u s s k , Skuteckého 1088, Praha 6, 163 00
Marie M a t o u š k o v á , Českomoravská 11, Praha 9, 190 00
PhDr. Svatava M a t o u š k o v á , Černá 11, Praha 1, 110 00
Eva M e d o m o v á , Vrážská 347, Černošice III, 252 28
Pavla S k a r l a n t o v á , Podolská 8, Praha 4, 147 00
Alena S l á d k o v á , Zárubova 487, Praha 4, 142 00
Ing. Ladislav V a r e l , Kamenická 4, Praha 7, 170 00

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
A										
B										
C										
D										
E										
F										
G										
H										
I										
J										

Helpiloj: G. IK 4. Elko, Tapa

Horizontale:

- A. La unua parto de la kaŝfraso.
- B. Poemet' pri laŭnatura, kampara vivo - brutar'.
- C. Greka litero - teatra ludisto - signo de nekonata persono.
- D. Kemia signo por aluminio - nom' de unu el la kvar kolorj de ludkartoj - maljeso - silabo de anasa parolo.
- E. Felicege - spec' de fumajita mango.
- F. La dua parto de la kaŝfraso.
- G. Marko de antaŭaj aŭtomobiloj - parto de la fiziko koncernanta la lumajn fenomenojn - konsonantoj de "taro".
- H. Kemiaj signoj por oksigeno kaj jodo - la tria parto de la kaŝfraso - sufikso de la presenta pasiva participo.
- I. Konsonantoj de "juto" - kuraca vegetaĵo - esperanta vokalo.
- J. Bulba akragusta vegetaĵo usata kiel spicaĵo - part' de la homa korpo.

Vertikale:

1. Speco de dolĉaj prunoj.
2. Sekse matura.
3. Montra pronomo - adjektivo de katodoj.
4. Germana junulina nomo - urbo en Estonujo - konsonantoj de "rolo".
5. Azota sterkaĵ' - loganto en Estonujo.
6. Antaŭpag' - intelekt'.
7. Adverbo de horo - norda cervo - mallongigo por "kaj aliaj".
8. Kokina produkto - grasa fluaĵo - konjunkcio de komparacio.
9. Superigi iun aŭ ion.
10. Arto ornam.

Ĉestmír Vidman, Praha 10

la kaŝfraso: laŭnatura kampara vivo - brutar'.

estas organizaĵo, kies celo estas helpi al praktika realigo de la ideo de "reveno de Ĉeĥoslovakio en Eŭropon" kaj malfermiĝo al la mondo en ĉiuj sferoj de vivo de la socio sur la nivelo de unuopuloj, familioj kaj interes-grupoj. Ĝi estis fondita kun la konvinko, ke la efektivaĵoj reciprokaj amikaj rilatoj inter nacioj kutime ne estiĝas sur la t. n. alta nivelo - surbaze de oficialaj vizitoj de ŝtatestroj aŭ registaraj reprezentantoj, aŭ per subskribo de internaciaj komercaj kontraktoj. La bazon de amikaj rilatoj devas formi multnombraj personaj amikecoj kaj intereskontaktoj, kiujn la Ĉeĥoslovaka Contact Club certigas pere de korespondado, vojaĝado, kolektado, hobiaj kaj plumaj interes-aktivecoj.

En pasinta tempo la oficialaj instancoj donis tre selektivajn subtenon al la menciita maniero de kontaktoj. Preferataj estis precipe la kontaktoj de tipo "amikeco" kaj male - intence malebligataj kaj subpremataj la nuraj aludoj de orientigo al aliaj ol "amikigintaj" landoj. Sekve ne povas esti surpriza la nuna grandega intereso de ĉeĥoj kaj slovakoj - antaŭ ĉio de junaj homoj, studentoj kaj inteligentularo - pri ligo de amikaj rilatoj tra la tuta mondo.

Skribu pri via intereso korespondi en kiu ajn lingvo al: Czechoslovak Contact Club, 143 00 Prague 4, Czechoslovakia.

Oni proponas peri amikajn kontaktojn en Ĉeĥoslovakio al unuopuloj, familioj kaj interesgrupoj (korespondado, konatigo, kolektado, hobiaj kaj aliaj interes-aktivecoj). Ĉiuj anoncoj kaj sciigoj senpage! Estas eble mendi CCC-magazinon kun adresoj, personaj indikoj kaj interesigoj kaj fotografaĵoj de interesuloj el Ĉeĥoslovakio kaj la tuta mondo.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 Prago 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Jiří Hanousek (grafika aranĝo), Ing. Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Jiří Patera (respondeca redaktoro), Ing. Zdeněk Pluhař kaj Helena Štruncová. Presas Entrepreno por servoj de urbo Liberec. Transdonita al la presejo 1990-07-15. Jarabono 36 CSK, por eksterlando 48 CSK aŭ 14 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Jiří Hanousek (grafická úprava), Ing. Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor), Ing. Zdeněk Pluhař a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18.3.1985. Tiskne Podnik služeb města Liberce. Předáno do tisku 15.7.90. Dohledací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovné povolen Ředitelstvím pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.

Artikolo el brita urbo-jurnalo Chatham Standard, de la 17-a de aprilo 1990

Titolo: PLUMAMIKA PENSIULO SUPERSUTITA DE POSTO -
- ĈIO EN ESPERANTO!

Subtitolo: Nun Jack celas solvi sian problemon per instruado

Teksto:

Rimarkinda pensiulo de Rainham (rajnm) estas supersutita de leteroj de Ĉeĥoslovakio, en la stranga lingvo, Esperanto.

Jack Gray (ĝak grej), kiu estas 78-jara fine de ĉi tiu monato, estas ricevinta 48 leterojn de ĉeĥoj, dum dusemajno, petantaj, ke li farigu plumamiko.

"Estas vere tro. Mi ne povas sukcese lukti," diris s-ro Gray, kiu loĝas en Taverner's Road (tavnz roud).

Do, Jack planas starigi Esperanto-klason por junuloj en Rainham, por ke ili povu respondi al la leteroj kaj komenci plumamikecojn kun la ĉeĥoj. Jack ekstudis la artefaritan internacian lingvon lastjare, ĉar li firme kredas je internacia komunikado.

S-ro Gray skribis al la nacia ĵurnalo Daily Mail (dejl mejl) antaŭ pli ol jaro, apelacianta degelon en la tiamaj frostaj rilatoj inter Oriento kaj Okcidento. Multaj homoj kontaktis lin post kiam la letero estis eldonita, por esprimi sian subtenon. S-ro Gray estis sufiĉe kuragigata por peti la helpon de Rainham-lernejinfanoj, por skribi al infanoj malantaŭ la tiel nomata Fera Kurteno. Sed neniu respondoj estis alvenantaj, kaj, kvankam s-ro Gray estis ekstudinta la rusan, li decidis, ke li plu progresus, se li lernus Esperanton. Do, li komencis la studadon per lernolibro de la serio Teach Yourself (tic joeself - instru vin mem). Li prave decidis. Baldaŭ li havis ok orienteŭropajn plumamikojn. Unu el ili, 28-jara virino, venas de Vilnius, ĉefurbo de Litovio. Ŝi estas skribinta por informi s-ran Gray pri sia ekscitigo, antaŭvidante sendependecon disde Sovetunio.

Esperanto estas elpensita de pola kuracisto, antaŭ cent jaroj, por antaŭenigi la internacian harmonion.

S-ro Gray, iama ĉeflekciisto pri konstruscienco ĉe Teknologia Kolegio de Medway (meduej), gvidis klason de lernejinferoj studentaj Esperanton dum la someraj ferioj, sed kiam ili rekomencis ĉelerneje, iliaj normalaj studobjektoj estis pli gravaj.

Li kredas, ke lia grupo estis raportita en Ĉeĥa Esperanto-novaĵletero, kaj pro tio ili estas ricevintaj tiujn leterojn.

Kelkaj el ili estas venintaj de infanoj tiom junaj kiom okjaraj.

S-ro Gray estos stariganta sian unuan kunvenon por iu interesata pri lerno de Esperanto, je 9.30 atm ĉe Halo de Metodistoj, Station Road (stejzn roud), Rainham, sabaton, la 28-an de aprilo.

Jack Gray

64 Taverner's Road

Rainham, GILLINGHAM, Kent, Anglio, ME8 9AN.

Esperantigita

de David Curtis, 19.4.90

Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979